

# La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2022. №4



SOLNOC • JUNTOS

ENSEMBLE •

KUNE •

心手相连



TOGETHER

## Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2022. №4 (314)

**La Ondo de Esperanto** aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

**Aperas** ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

**Eldonas kaj administras:** Halina Gorecka

**Redakcio:**

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

**Poŝta adreso:** RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

**Retpoŝta adreso:** laondodeesperanto@gmail.com

**Retejoj:** <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

**Abontarifo por 2023**

Abonanto: 15 eŭroj, 15 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 30 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 100 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

**Anonctarifo**

Plena paĝo: 50 eŭroj (2500 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1500 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (750 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (500 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj:** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

**Recenzoj:** Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

**Represoj:** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2022, №4 (314).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.



Подписано в печать: 31 декабря 2022 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i> . . . . .	2
En ĉi tiu numero. . . . .	3
<b>Temo</b> . . . . .	<b>5</b>
Paweł Fischer-Kotowski. Edmund Grimley Evans: La Esperantisto de la Jaro 2022 . . . .	6
Elektokomisiono de La Esperantisto de la Jaro 2022 . . . . .	7
<b>Eventoj</b> . . . . .	<b>8</b>
Povilas Jegorovas. Esperanto en Litovio 2022: Atingoj kaj malsukcesoj . . . . .	9
Ronald Schindler. Denove ĉeesta Zamenhoffesto en Berlino . . . . .	14
Renato Corsetti. Zamenhof en Londono kaj la brita leono . . . . .	15
Laura Brazzabeni. Italoj en la Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj . . . . .	17
Qiu Xirong, Xu Jinming. Ĉeeste kaj virtuale en Hangzhou . . . . .	18
Sankt-Peterburgo: Omaĝe al Zamenhof kaj Haazen. . . . .	19
Aranka Laslo. Serbio: Lingvo por ĉiuj . . . . .	20
Nikolao Gudskov. Malgrandronde en Moskvo. . . . .	20
Ostoj Kristan. Zamenhof-Tago 2022 en Ljubljano . . . . .	21
Madrido: Faraono, neŭtraleco kaj frandaĵoj. . . . .	21
Aranka Laslo. La 32an fojon en Senta . . . . .	22
Elisabeth Ld. Vannes: Kuskuso kaj teatraĵo . . . . .	22
Petro Zilvar, Harald Mantz, Zsófia Kóródy. Novaĵoj el Herzberg am Harz. . . . .	23
Heinz-Wilhelm Sprick. Koncerto de Abel Massiala en Sumpflume . . . . .	25
Heinz-Wilhelm Sprick. Antaŭkristnaska amika festo en Hameleno . . . . .	26
Katalin Kováts. La deka Tutmonda Ekzamentago. . . . .	28
Irina Gonĉarova. Moskvo: La dek-unua KER-sesio. . . . .	29
Irina Gonĉarova. La Moskva Lingva Festivalo revenis . . . . .	30
Aurora Bute. Rumanio: Nova asocia estraro. . . . .	32
Paulo S. Viana. Denove renkontiĝis esperantistoj en la Paraiba Valo . . . . .	34
Fábio Silva. SUMIRE: La kvaran fojon en Poŭzalegro . . . . .	35
Esperanto en la 88a mondkongreso de PEN . . . . .	35
Ilona Koutny. UAM: Magistraj studoj komenciĝis. . . . .	36
François Lo Jacomo. La Akademio konferencis Zamenhof-Tage . . . . .	37
La Eŭropa Parlamento menciis Esperanton . . . . .	38
Mondpokalo 2022: Esperanto sur la pilkoj. . . . .	39
Panteono por... vivantaj herooj. . . . .	40
Pollanda ministeria medalo por Roman Dobrzyński . . . . .	41
Dek mil dolaroj por via asocio . . . . .	42
Elekto de novaj Komitatoj B de TEJO . . . . .	42
UEA invitas proponojn prelegi en IKU 2023 en Torino. . . . .	43
UK-108: jam 468 aliĝintoj el 50 landoj. . . . .	43
BET-57 okazos en Ventspils . . . . .	44
Aŭstralio: Kongreso kaj somerkursaro 2023 . . . . .	45
Bharat Kumar Ghimire. Kvina Speciala Ekskurso en Nepalo . . . . .	46
PSI: Printempa renkontiĝo por ĉiuj aĝoj . . . . .	47

<b>Tribuno</b> .....	<b>48</b>
Niaj atingoj kaj malsukcesoj dum 2022 .....	49
Amri Wandel. Novjara mesaĝo de la prezidanto de AIS .....	54
Riichi Karibe. Novjara saluto de la Konsulo de la Esperanta Civito .....	55
Peter “Petro” Baláž. JarKompasso: Planu novan jaron en Esperanto .....	56
Mesaĝo de UEA okaze de la Zamenhofa Tago kaj la Tago de la Esperanta Libro .....	57
Ankoraŭfoje pri protestoj: Kiom kaj kiuj protestas? .....	58
Vjaĉeslav Ivanov. Ruslandano instruas en la ĉefurbo de Senegalio .....	62
Amri Wandel. Precizigo pri la scienca programo de la 107a UK .....	63
<b>Arkivo</b> .....	<b>64</b>
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2023. ....	65
Aleksander Korĵenkov. Kronikisto: Du plonĝoj en la pasinteco .....	68
<b>Kulturo</b> .....	<b>70</b>
Aleksander Korĵenkov. Mi prenas pecon da vivo.....	71
Fjodor Sologub. La belo. Transformiĝoj. La reĝino de kisoj. Traserĉo. La vojo al Emaus.	
La fianĉino de Judaso (Tradukis V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova) .....	72
Ĵenja Amis. Ses rakontoj .....	101
Paulo Sérgio Viana. Letero al Doktoro P. ....	106
Miguel Fernández. Du nuntempaj hispanaj poetoj .....	109
Wolfgang Kirschstein. Venĝi sian rason .....	116
Carlo Minnaja. Laŭro de la Akademio por <i>Sesdek ok</i> de Sten Johansson .....	117
Wim Jansen. Akademio, legu! (Recenzo: Ryszard Rokicki. <i>Enkonduko en la morfologion de Esperanto</i> ) .....	119
Carlo Minnaja. Grandioza florkolekto (Recenzo: Marjorie Boulton. <i>Unu animo homa</i> ) ..	121
Sten Johansson. Post rikolto necesas draŝi (Recenzo: <i>Belarta rikolto 2022</i> ) .....	124
Wolfgang Kirschstein. Bluaj ĉevaloj, kurbe klinaj domoj kaj torditaj korpoj (Recenzo: Sten Johansson. <i>Secesio</i> ) .....	126
Paŭlo Moĵajjevo. Fortika, eĉ se diskreta albumo, bezonanta kelkfojan traŭskulton (Recenzo: i.d.c. <i>Fulmerford</i> ) .....	127
Literatura Konkurso 2022 – rezulto .....	129
Kjara kun Esperanto-kanto venkis en Eŭropa konkurso por kantoj en minoritataj lingvoj .....	130
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako</i> , junio 2022. ....	131
<i>Unesko-Kuriero</i> . Tradukado: De unu mondo al alia. ....	132
Fino de la 53a jarkolekto de <i>Literatura Foiro</i> .....	133
<b>Mozaiko</b> .....	<b>134</b>
Stanislav Belov. Feliĉan Novan Jaron! .....	135
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj .....	136
Perantoj de <i>La Ondo de Esperanto</i> .....	137

**Kovropaĝe:** El la ses oficialaj lingvoj de UN sur la pilko “Al Hilm” (La revo), uzita en la finalo de la futbala mondopokalo 2022 en Kataro, restis kvin: la angla, araba, ĉina, franca kaj hispana. Anstataŭ la sesa, la rusa, la frimao “Adidas” surpilkigis ... Esperanton. La matĉon spektis pli ol unu miliardo da teranoj, kiuj povis vidi la vorton “kune” anstataŭ “вместе”.

# Temo



La eldono de la duvoluma plena originala poemaro de Marjorie Boulton iĝis eble la plej grava evento en la kultura vivo de Esperantujo dum 2022, kaj la editoro de *Unu animo homa*, Edmund Grimley Evans, ricevis la honoran titolon La Esperantisto de la Jaro 2022.

# Edmund Grimley Evans: La Esperantisto de la Jaro 2022



**La Ondo de Esperanto** iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Koppel Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korĵenkov (2009), Katalin Kováts (2010), Dennis Keefe (2011), Peter Baláz (2012), Mark Fettes (2013), Mireille Grosjean (2014), Chuck Smith (2015), Stefan MacGill (2016), Trezoro Huang Yinbao (2017), Hori Jasuo (2018), Anna Löwenstein (2019), Fernando Maia Jr. (2020) kaj Halina Gorecka (2021).

Ĉi-jare temas pri jubileo, ĉar la titolo estis atribuita por la 25a fojo. 16 kandidatoj proponis por la titolo 20 personojn, al kiuj 16 elektantoj jene donis siajn voĉojn:

**Edmund Grimley Evans – 5 voĉoj**

Ilona Koutny – 4 voĉoj

Ahmad Mamduhi, Wang Tianyi – po 3 voĉoj

Tri kandidatoj ricevis po du voĉojn, ses kandidatoj ricevis po unu voĉon.

**Edmund Grimley Evans** estas 56-jara brita matematikisto kaj komputilisto, kiuj ekde la studentaj jaroj aktivas en la Esperanto-movado. Estrarano de Esperanto-Asocio de Britio (EAB) seninterrompe ekde 1997, en la jaroj 1999–2004 kaj denove ekde 2021 ĝia prezidanto, ekde 2013 akademiano. Patro de du filinoj, kun kiuj li ĉiutage parolas nur en Esperanto.

Grimley Evans plenumis gravan rolon en la lastatempa libroeldonado de EAB – kiel tradukinto, redaktoro aŭ provleginto. *La Krubalo*, kiun li redaktis, kaj *La domo ĉe Pu-angulo*, kiun li tradukis, ricevis la titolon “Infanlibro de la Jaro” en 2020, respektive 2022. Ĉi-jare sub lia redaktoreco aperis *Unu animo homa*, duvoluma kolekto de la plena poezia verkaro de Marjorie Boulton. Grimley Evans laboris pri tiu projekto preskaŭ dek jarojn, parte konsulte kun Boulton.

Gratulon al la Esperantisto de la Jaro 2022 Edmund Grimley Evans!

**Paweł Fischer-Kotowski**  
sekretario

# Elektokomisiono de La Esperantisto de la Jaro 2022

## Proponantoj

Marija Belošević (Kroatio): prezidantino de IKUE

Marek Blahuš (Ĉeĥio): eksestrarano de E@I, vikimediano, komputila lingvisto

Renato Corsetti (Britio): akademiano, eksprezidanto de UEA

Albert S. T. Garrido (Filipinoj/Hispanio): prezidanto de TEJO

Arko Gong Xiaofeng (Ĉinio): prezidanto de la ĉina sekcio de ILEI, eksa vicprezidanto de ILEI

Edmund Grimley Evans (Britio): akademiano, prezidanto de EAB

Lee Jungkee (Koreio): direktoro de Seula Esperanto-Kulturcentro

Vinko Markovo (Francio): prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT

Valentin Melnikov (Ruslando): poeto, ĵurnalisto, tradukanto, recenzisto, akademiano

Barbara Pietrzak (Pollando): radioĵurnalisto, redaktoro, akademiano

James Rezende Piton (Brazilo): tradukanto, aktivulo de Esperanto-Ligo Filatelista (ELF/AAREK), komitatano B de UEA

Sibayama Zyun'iti (Japanio): ĉefredaktoro de *La Revuo Orienta*

Chuck Smith (Usono/Germanio): kunfondinto kaj teknikestro de *Amikumu*

Franciska Toubale (Aŭstralio): kunlaboranto de la radio 3ZZZ

Paulo Sergio Viana (Brazilo): tradukanto kaj preleganto

Ĉielismo Wang Tianyi (Ĉinio): prezidanto de IKEF, direktoro de Ĉina Esperanto-libro-servo, komitatano de ĈEL

## Elektantoj

Peter Baláž (Slovakio): kunordiganto de E@I

Osmo Buller (Finnlando): eksa Ĝenerala Direktoro de UEA

Petr Chrdle (Ĉeĥio): posedanto de la eldonejo KAVA-PECH

Agneta Emanuelsson (Svedio): prezidanto de ILEI-SE, senatano de la Esperanta Civito

Mireille Grosjean (Svislando): eksprezidanto de ILEI, prezidanto de Svisa Esperanto-Societo

Anne Jausions (Francio): eksprezidantino de OSIEK

Reza Kheir-khah (Tajvano): redaktoro de *Formoza Folio*

Katalin Kováts (Nederlando): lingvisto, metodologo, redaktoro de edukado.net, eksakademiano

Liu Haitao (Ĉinio): profesoro pri (inter)lingvistiko, akademiano

Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio): eksvicprezidanto de UEA, iniciatinto de *Unesko-Kuriero* en Esperanto

Vasil Kadifeli (Turkio): tradukanto, eldonanto de *Turka Stelo*

Tahira Masako (Japanio): kunlaboranto de KAOEM

Tim Owen (Britio): akademiano, direktoro de EAB

Anna Ritamäki-Sjöstrand (Finnlando): prezidanto de kooperativo Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors

Roland Rotsaert (Belgio): redaktoro de *Monato* pri ekonomio


Syōzi Keiko (Japanio): kunlaboranto de la Redakta Fakto de JEI, iniciatinto de *Libroteko*

*Tokio*

## Sekretario


Paweł Fischer-Kotowski (Pollando)

# Eventoj



**ESPERANTO**  
Zamenhof-Tago  
Esperanta Libro-tago  
15.12.2022

*Kiam la popoloj povos libere  
sin kompreni, tiam ili ĉesos  
reagrade sin malami.*



AUTORO DE  
ESPERANTO  
POLSKA 06

*Zamenhof*

Unuafoje post la antaŭpandemia decembro 2019, en la jarfina “Ondo” denove aperas artikol(et)oj pri multaj diverslandaj Zamenhof-Tagaj renkontiĝoj. Ilin garnas fotoj kun verdaj standardoj, steloj kaj entuziasmaj vizaĝoj. Esperantujo gaje festas sojle de la 2023a jaro...





Povilas Jegorovas raportas (Foto: Gražvydas Jurgelevičius)

## Esperanto en Litovio 2022: Atingoj kaj malsukcesoj

Ĉiujare en Litovio la Zamenhof-Tagoj koincidas kun la kongreso de Litova Esperanto-Asocio (LEA). Ankaŭ ĉi-jare la 10an de decembro okazis la 57a kongreso de LEA kaj la 10-11an de decembro okazis Zamenhof-Tagoj 2022. Al la kongreso venis 80 esperantistoj el ok Litoviaj urboj kaj du gastoj el Latvio.

Post kelkaj enkondukaj frazoj de la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas per minuto da silento estis honoritaj ĉi-jare forpasintaj esperantistoj: eksa prezidantino de la Esperanto-klubo de Panevėžys Lina Jablonskienė kaj veterano de la Litovia Esperanto-movado Valdas Banaitis.

Sekvis raporto de la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas pri la agado de la asocio dum la 2022a jaro. La jaro estis intensa, malfacila, streĉita, tamen enhavoriĉa kaj sufiĉe sukcesa. Estis multe da ĝojo kaj same de senreviĝo.

### La ĉefa atingo: BET-56 en Klajpedo

La ĉefa jaratingo estis la sukcesa organizado kaj realigo de la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Ĝi post la pandemia paŭzo okazis la 9-17an de julio en Klajpedo. Tamen ĝi ankoraŭ estis parte stampita de la finiĝanta pandemio kaj ankaŭ de la komenciĝinta milito de Ruslando kontraŭ Ukrainio. Ĝuste pro tio al BET-56 ne povis veni esperantistoj el Belorusio kaj Ruslando. Ankaŭ el Ukrainio venis ne multaj. Aliĝis

263 esperantistoj el 31 landoj, kaj reale venis nur 230. Tamen ankaŭ tiu nombro estas sufiĉe alta. BET-56 estis la plej multnombra ĉi-jara esperantista aranĝo post la Universala Kongreso en Montrealo. Menciindas, ke unuafoje al BET venis funkcianta prezidanto de Universala Esperanto-Asocio prof. Duncan Charters. Estis tre intensa, altkvalita kaj riĉa programo de BET-56, konsistanta el scienca, eduka, kleriga, movada, kultura kaj ekskursaj partoj.

La solidecon de BET-56 pravas ĝiaj eldonaĵoj – Libro por BET-ano, Libro de Internacia Kongresa Universitato kaj de la 38a Scienca Universitata Sesio, okazinta enkadre de BET-56, faldfolio pri Klajpedo kaj ok kvarpaĝaj numeroj de la ĉiutaga BET-gazeto *Lumturo*, redaktita de Taesok Choe.

BET-56 estis vaste prezentita en litovlingva kaj esperantlingva reta kaj papera gazetaro. Ĝi estis rezulto de longa kaj intensa ĉiutaga laboro de Litoviaj kaj de kelkaj eksterlandaj esperantistoj.

## **Ampleksa informado**

Dum multaj jaroj LEA havas tre bonajn kunlaborajn kontaktojn kun Litoviaj retaj kaj paperaj amaskomunikiloj. Kutime pri ĉio grava aperas artikoloj en pli ol dek lokoj. Daŭris aperigo de rakontoj de Litoviaj esperantistoj en la novaĵretejo *Mano kraŝtas*. Jam aperis 187 tiaspecaj publikaĵoj. Tre vaste estis prezentita la nova Esperanta-litova vortaro de Gediminas Degėsys, 85-jara jubileo de litova Esperanto-veterano Vytautas Ŝilas, lia jubilea aranĝo kaj prezento de lia bibliografia libro en la biblioteko de Litovia scienca akademio, BET-56 en Klajpedo.

Konstante aperas publikaĵoj de Gediminas Degėsys. En Jurbarkas, Ŝiauliai kaj Panevėžys aperis publikaĵoj lige kun diversaj Esperanto-eventoj en tiuj urboj. Okazis grava elsendo de Litova nacia televido en la serio “Daiktų istorijos” pri poliglotoj, inter ili pri Gediminas Degėsys.

La ekspozicio pri la vivo kaj agado de Ludoviko Zamenhof jam dum kvar jaroj marŝas tra Litovio. Ĝi okazis en pliaj urboj – kutime en publikaj bibliotekoj, kulturcentroj aŭ muzeoj de tiuj urboj. Ĝis nun ĝi jam okazis entute en 38 Litoviaj urboj. Ĉiam lige kun tiu ekspozicio en konkreta urbo aperas multaj publikaĵoj pri Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto en gazetaro de tiuj urboj. Laŭplane ĝi okazos en ĉiuj 60 distriktaj urboj de Litovio.

## **Novaj eldonaĵoj**

Dum la jaro estis eldonitaj kelkaj libroj. Krom tri eldonaĵoj, rekte ligitaj al BET-56 (Libro por BET-ano, IKU-SES libro, faldfolio pri Klajpedo), aperis ankaŭ la menciita Esperanta-litova vortaro de Gediminas Degėsys, kelklingva vortaro de leva Ŝvarcaitė pri pejzaĝesploraj terminoj, bibliografio de Vytautas Ŝilas. Kunlabore kun la Kaliningrada eldonejo *Sezonoj* aperis grava esperantologia libro de Ryszard Rokicki *Enkonduko en la morfologion de Esperanto*. Ĝin la aŭtoro mem prezentis dum BET-56 en Klajpedo.

LEA helpis al la eldonejo *Impeto* presi en Kaŭno la libron de Mikaelo Bronŝtejn *Simeono* pri la elstara Peterburga esperantisto Semjon Podkaminer. Ĝin la aŭtoro ankaŭ virtuale prezentis dum BET-56 en Klajpedo. En Marijampolè Angelè Straleckienè dulingve eldonis du siajn poeziajn libretojn. Petras Čeliauskas finkompilis novan grandan (pli ol 800-paĝan) Esperantan-litovan vortaron, kiu devos aperi sekvontjare. Sian vicon atendas ankaŭ aliaj libroj.

## Pliaj agadoj

Pro la ankoraŭ daŭranta pandemio senperaj internaciaj kontaktoj dumjare ne estis multaj. Tamen junularo sukcesis reale partopreni en la junulara festivalo en Italio, Internacia Junulara Kongreso en Nederlando kaj aliaj internaciaj aranĝoj. Aida Čižikaitė partoprenis en la denove okazinta ARKONES en Poznano. Jogailė Čolūtė partoprenis en esperantista aranĝo en Danlando. En la 3a Virtuala Kongreso partoprenis 12 Litoviaj esperantistoj.

Krom BET-56 en Klajpedo, septembre okazis jam la 15a ĵurnalista seminario en Aukštadvaris. Same septembre okazis tre solida aranĝo por marki la 50-jaran jubileon de la Esperanto-klubo *Horizonto* en Jurbarkas ankaŭ kun kelkaj tre gravaj publikaĵoj en loka gazetaro pri la evento.

En la monata revuo *Turka Stelo* konstante aperas tradukoj el la litova lingvo de Antanas Vaitkevičius el Alsėdziai kaj humuraĵoj de Laimundas Abromas el Jurbarkas. En la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* kaj en la samtitola bitgazeto konstante aperas artikoloj pri agado de Litoviaj esperantistoj.

Litoviaj esperantistoj grave kontribuis al la kampanjo de Eŭropa Esperanto-Unio en la diskuto pri la estonteco de Eŭropa Unio, rezulte de kio en la fina dokumento de la diskuto aperis pozitiva mencio pri Esperanto.

Tre grava estis la reaktiviĝo de la junularo. Kvar studentinoj de Vilno kaj Kaŭno (Aušrinė Tamošiūnaitė, Eidmantė Lileikytė, Severija Marija Banaitytė kaj Jogailė Čojūtė) organiziĝis kaj fondis la organizaĵon LEJO (Litova Esperanto Junulara Organizo) kaj jam registris ĝin. Ili partoprenis kelkajn esperantistajn aranĝojn eksterlande, aktivis ankaŭ en BET-56 kaj havas multajn ideojn por la estonta agado.

Instruado de Esperanto dum la jaro ne estis aktiva, tamen ĝi okazis en Vilno, Šiauliai, Panevėžys, Mažeikiai, Ukmergė, iom ankaŭ en Kaŭno. Estis reklamita la reta kurso de Esperanto pli frue aperigita en la novaĵretejo *Mano kraŝtas*.

Esperanto-Societo de Vilno (VED) post la dekjara gvidado de Algimantas Piliponis elektis novan prezidanton. Nun VEDon gvidas Nijolė Žambaitė.

Ekde 1996 funkcias la retejo de Litova Esperanto-Asocio. Ekde 2000 aktive ekzistas diskutlisto de litovaj esperantistoj kaj ekde 2014 tre aktive funkcias Facebook-paĝo de la asocio. Do, ni havas tri informkanalojn, kiuj estas renovigataj ĉiutage, kaj tiamaniere la interna informado inter litovaj esperantistoj funkcias tre bone.

La agado de LEA ĉi-jare estis agnoskita ankaŭ internacie – ĝia prezidanto Povilas Jegorovas estas honorita per Diplomo de elstara agado de UEA.



LEJA aktivas: Eidmantė Lileikytė kaj Aušrinė Tamošiūnaitė (Foto: Gražvydas Jurgelevičius)

## La ĉefa problemo

En 1992 per registara decido al LEA estis disponigita por senpaga uzado la iama domo de Aleksandro Zilbernik sur la strato Zamenhof №5 en Kaŭno. Reale ni tie instaligis fine de 1993. Sed intertempe en Litovio aperis novaj leĝoj, kiuj ebligis senpagan uzadon de municipa aŭ ŝtata posedaĵo nur por tre limigita kvanto de sociaj organizaĵoj kaj nur por dek jaroj. LEA laŭ la leĝaj kriterioj ne povas eniri liston de tiaspecaj organizaĵoj. Krome, ni uzas tiun domon jam dum preskaŭ 30 jaroj. Krome, la domo dum tiuj jaroj kadukiĝis kaj bezonis fundan riparon. La asocio laŭ sia financa stato ne povis pagi luon, nek financi tiun fundan riparon.

Jam en 2010 komenciĝis diskutoj pri ĉi tiu domo kun la urba municipo de Kaŭno, ekde 2016 kun speciala ŝtata instanco “Turto bankas”, kiu administras ŝtatajn nemoveblaĵojn. Diskuto transiris al juĝejo. Ĉiuj tri juĝinstancoj decidis, ke Litova Esperanto-Asocio devas liberigi la domon, ĉar ĝi laŭleĝe ne povas senpage uzi ŝtatan nemoveblaĵon. Definitiva decido okazis la 19an de februaro 2018. Kaj tamen la procedo pro multaj juraj aspektoj kaj trukoj daŭris ankoraŭ kvar jarojn, kaj la 15an de septembro 2022 la domo estis vendita en aŭkcio.

La ĉefa tasko de LEA estis tuj trovi provizoran lokon por la granda havaĵo de la asocio – biblioteko, libroservo, arkivo k. s. Per multaj penoj ni tion trovis. Poste dum kvar monatoj ĝis decembro ni okupiĝis pri pakado kaj transportado de la tuto al la nova sekura loko. Pri tio okupiĝis ĉefe la respondeca sekretario de LEA Asta Nastaravičiūtė kaj la libroservistino Irena Jagminaitė. Ili meritas grandegan dankon pro tiu heroeca laboro. Entute estis pakitaj kaj forveturigitaj pli ol 300 grandaj kartonaj kestoj. Iom da havaĵo bezonata por ĉiutaga uzado estis lokita en alia ejo trovita najbare de la nuna Zamenhof-domo.

Nia tasko estas trovi solvon, ke la tuto estu disponebla en eventuala nova ejo. Kelkaj ideoj pri tio estas, la plej reala estas solvi tion kunlabore kun unu el la universitatoj de Kaŭno. Sed tio estas tasko por estonteco. Nun plej gravas, ke ĉio estas savita kaj konservata en sekura loko. Ankaŭ ni kontaktiĝis kun la nova posedanto de la domo. Li evidentiĝis bonvolema kaj komprenema homo. Post funda riparo de la domo fare de la nova posedanto, ni eventuale ricevos eblecon uzi negrandan spacon en ĝi por niaj celoj.

Tia estas kurta skanaĵo de la agado de Litova Esperanto-Asocio dum la jaro 2022.

Post la raporto kaj ĝia pridiskuto estis enmanigitaj dankfolioj kaj etaj donacetoj al jubileuloj de la nuna jaro. La kongreso finiĝis per komuna fotado.

## **Zamenhof-Tagoj 2022**

En la dua parto – Zamenhof-Tagoj 2022, dediĉitaj al la 163a datreveno de la naskiĝo de Ludoviko Zamenhof – niaj junaj aktivulinoj Aušrinė Tamošiūnaitė, Eidmantė Lileikytė kaj ankaŭ Aida Čižikaitė rakontis pri siaj impresoj el internaciaj esperantistaj aranĝoj okazintaj ĉi-jare en Italio, Nederlando kaj Pollando. La prezidanto de Latvia Esperanto-Asocio Margarita Želve prezentis la 57ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn, kiuj okazos en julio 2023 en Ventspils, Latvio.

Fine de la taga programo Vytautas Šilas kantis mem kaj kantigis ĉiujn. Sonis ĉefe konataj kaj ankaŭ novaj kantoj en Esperanto – internaciaj kaj litovaj tradukitaj al Esperanto. Plejparton da ili tradukis Vytautas Šilas mem. Restintoj por la sekva tago dimanĉe ekskursis tra la urbo sub la gvido de Antanas Visockas.

LEA donacis al la biblioteko de la universitato pri sansciencoj de Kaŭno tridek librojn – ĉefe lernolibrojn kaj vortarojn.

Dum la aranĝo funkciis riĉa libroservo. Eblis pagi membrokotizon de LEA kaj UEA, aliĝi al UK en Torino kaj al BET-57 en Latvio.

**Povilas Jegorovas**  
prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

**Iĝu abonanto de *La Ondo de Esperanto*  
kaj legu nian ĉiusezonan almanakon.**



Jele koncertas en Berlino

## Denove ĉeesta Zamenhoffesto en Berlino

En 2020 la Zamenhoffesto en Berlino okazis virtuale, kaj en 2021 ĝi ne okazis. Sed ĉi-jare la berlinaj kaj brandenburgiaj esperantistoj sukcesis inviti denove al Zamenhoffesto en la Oranĝerio de la civitana renkontiĝejo de la distrikto Lichtenberg en Berlino. Bonŝance ni jam estas sufiĉe konataj tie.

Al la Zamenhoffesto, kiu okazis la 17an de decembro 2022 venis ĉirkaŭ 40 personoj. Ni povis bonvenigi esperantistojn el Pollando, Nederlando, Italio kaj Kazahio. Memkompreneble partoprenis pluraj berlinaj kaj kelkaj brandenburgiaj gesamidanoj.

Tuj post la malfermo okazis festprelego de nia samideano Philipp Sonntag. Li parolis pri "Esperantistinoj, Filinoj de Elizeo", konata de la 9a simfonio de Ludvig van Beethoven kun politikaj rilatoj de la nuntempo. Paralele jam komenciĝis vigla kafumado kun kafoklaĉo. Bedaŭrinde la koncerto de Hans Moser kun la kantistino Simone Nauck ne povis okazi pro malsaniĝo de ambaŭ. Tial povis okazi nur eta muzika interludo. Estis elektita la pertelefona aranĝado de Ĵomart kaj Nataŝa, kiuj prezentis la kanton *Haleluja*.

Interesa afero, apud multaj aliaj, estis la prezentado de Ermanno Tarracchini kaj Laura Barbieri de la libro *La ĉiutaga vivo kiel historio sen timoj kaj sen psikiatrio*,

verkita de Antoinetta Bernardoni. Ermanno kaj Laura venis el Modena en Italio por komenci prezentadon de tiu libro tra Eŭropo. Interesan kontribuadon prezentis Maira Baradossova el Uralsk (Kazaĥio) pri specialaj kuracmetodoj de korea esperantistokuracisto (esperanta nomo Junĉjo). Ŝi jam spertis tiun metodon.

Sekvis koncerto de ĴeLe el Schwedt kaj Bremeno. Ili prezentis muzikon laŭ tri diversaj stiloj kun kaj sen kantado. De klasika muziko ĝis Kristnaskaj kantoj la ĉeestintoj ĝuis la etoson.

Fritz Wollenberg prezentis du siajn urbogvidilojn tra diversaj partoj de Berlino. Li kolektis grandan materialon, kiu ĉefe rilatas al Esperanto en Berlino. Tiuj urbogvidiloj bone taŭgas por konatiĝi kun la urbo, ties arkitekturo kaj historiaj kaj nuntempaj ejoj pri kaj por Esperanto.

Je la 18a horo en la klubejo estis proponita vespermanĝo. Ĉiuj povis ĝui la bonegan soljankon.

Halina Rózanek el Szczecin vivigis la partoprenantojn per tri kantoj, kiuj samtempe estis ludoj por ĉiuj: Ŝi elektis la kanzonojn *La Kukolo*, *Balado pri sep fratoj* kaj la Kristnaskan kanton *Malgranda tamburisto*.

Dum la tuta aranĝo ne mankis la tradicia libroservo de Johano Pachter, inkluzive de kelkaj libroj kiujn li alportis el Bjalistoko, kie unu semajnon pli frue ja okazis la tradiciaj Zamenhof-Tagoj. Kiel kutime, restis multaj porokazaj bakaĵoj kaj aliaj frandaĵoj por la kafumado. Memkompreneble, ni ne forĵetis tiujn restaĵojn, multaj estis ankoraŭ pakitaj origine, sed donacis la pakafetojn al maljunulejo kaj al lernejo en la urbo Frankfurt (Oder) por ĝojigi ankaŭ aliajn homojn.

Multan dankon al la kunagintoj kaj helpintoj por ornami kaj rearanĝi la salonon.

La sekvan Zamenhoffeston ni jam fiksas en la sama salono por la 2a de decembro 2023. Do jam notu la daton en via kalendaro por plani vian partoprenon!

**Ronald Schindler**

## **Zamenhof en Londono kaj la brita leono**

Zamenhof estis entuziasmulo kiel ĉiuj esperantistoj kaj la 12an de januaro 1904 li venkis terurajn teĥnikajn malfacilaĵojn por tiuj tempoj kaj registris en vaksan cilindron, tio estas la tiama ekvivalento de nia MP3, parolan saluton okaze de la unua datreveno de la fondiĝo de la Londona Esperanto-Klubo. En ĝi li interalie diris:

“Londono longe dormis, sed kiam ĝi vekiĝis, tio ĉi estos kiel vekiĝo de leono. Potenca voko iros el Londono kaj ĉiam pli kaj pli sonados kaj resonados en ĉiuj partoj de la mondo. Kun atento la popoloj aŭskultados la voĉon venantan el la potenca centro de la angle-parolantaj regionoj. Kiam pri frateco de popoloj kaj pri neŭtraleco de internaciaj rilatoj ekparolos tia potenca popolo, kiel la angla, la mondo aplaŭdos kun entuziasmo, kaj tiu sankta afero, por kiu ni batalas, ekmarŝos rapidege”.

Sed lia entuziasmo evidente estis troa. La Londona Klubo ja vekiĝis kaj faris multajn aferojn dum siaj 120 jaroj (kelkaj Universalaj Kongresoj, la eldono de la Biblio, la

liverado de kelkaj prezidantoj al UEA kaj multo plia) kaj ankoraŭ tenas sian tranĉeon kaj svingas sian flagon. Ankaŭ la britaj esperantistoj entute organiziĝis kaj ankoraŭ sukcese agadas, sed Zamenhof, bonŝance por li, ne povis antaŭvidi la historion de la 20a jarcento kaj la okazontajn katastrofojn, kiuj malhelpis tiun esperatan potencon vokon, kaj kaŭzis, ke el la anglalingvaj landoj iru alispeca potenca voko.

Ĉiuokaze antaŭ la jaro 2023a, en kiu la Londona Esperanto-Klubo festos sian 120an jar-datrevenon, ĝi kunvenis la 9an de decembro por festi Zamenhof-on kaj diskuti pri liaj ideoj surbaze de parolado, kiun li faris en Britujo en 1907 en Kembrigo. Temis pri unu el tiuj enhavoplenaj inaŭguraj paroladoj laŭ lia stilo, kiu donis la okazon por debati pri la sinteno de la nunaj membroj de la klubo al la lingvo kaj al la ideoj laŭ la klasika disdivido inter lingvo kun interna ideo kaj ideo kun interna lingvo. La ĉeestintaj londonaj esperantistoj naĝas inter la du polusoj, kelkaj pli proksimaj al lingvaj interesiĝoj kaj kelkaj pli proksimaj al la ideoj pri monda plibonigo de Zamenhof. Nur la malsato povis ĉesigi tiun debaton, de kiu oni iris al te-trinkado (la turisma instanco insistas pri tio, ke oni trinku nur teon por doni la ĝustan bildon al eksterlandanoj) kaj manĝado.

Lastaj rimarketoj:

– ni aparte fieras pro tio, ke junaj komencantoj el niaj kursoj partoprenis la feston;

– entute la kunvenintoj kaj kuraĝaj disvastigantoj de Esperanto en Londono (oni ja bezonas kuraĝon ĉi tie kvazaŭ por vendi glaci-ŝrankojn en la norda poluso), pli ol duone ne naskiĝis en Britujo, sed venas el la tuta mondo, ĉar la nuna Londono estas simila al la antikva Romo, en kiu kunvivis homoj el ĉiuj mondopartoj.

**Renato Corsetti**

nebrita sekretario de la Londona Esperanto-Klubo







© Dawid Gromadzki/UM Białystok

Ce la Zamenhofa monumento (Foto: Dawid Gromadzki)

## Italoj en la Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj

La 9-11an de decembro okazis la Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko, kaj Italio havis gravan rolon. La unua tago estis la vico de la unua renkontiĝo de la projekto Erasmus+ KA2, kie Instituto italiano di Esperanto (IIE) estas la ĉefkunordiganto kun partneroj UEA, Kosmo (Germanio), Bjalistoka Esperanto-Societo (BES). Partoprenis Laura Brazzabeni kaj Bruĉjo Casini, kiel ĝenerala direktoro kaj sekretario de IIE, kaj ankaŭ du italoj Francesco Maurelli kaj Sara Spanò por Kosmo.

Okazis ankaŭ prelego de Bruĉjo Casini pri la projekto “30 oraj horoj” kaj prezentado de la sperto de EsperRadio fare de Laura Brazzabeni. Ne mankis aliaj prelegoj de Walter Ŝelazny, de Teresa Pomorska “Prezentado de Vroclava Erasmus+”, kiu okazis pli frue dum la itala kongreso en Brescia, de Nina Pietuchowska pri la Białowieża praarbaro, kie okazis la tuttaga ekskurso sub la neĝo, de Kubo pri la projekto “Erasmus Vikipedio por Eŭropo” kaj denove Italio kun Sara Spanò kaj prelego pri “Krevoj en la realo: enkonduko pri la perturba arta ĝenro”.

Koncertoj amuzis nin dum la restado: “Ukulelo kaj Esperanto”, koncerto de pliaĝuloj el Centro de Socia Aktiveco en Bjalistoko, “Kantoj de Mordeĥaj Gebirtig” kun la grupo “Frey-Lech Band”, kaj Ĵomart kaj Nataŝa.

La etoso estis bela kaj familia kun komunaj manĝoj kaj kun solena flormetado al la monumento de Zamenhof en la urboplaco kun ĉeesto de la urbestro kaj aŭtoritatoj. Ege kortuŝa estis la momento de la solena enmanigo de la bronza medalo “Merita por kulturo Gloria Artis” de la ministro pri kulturo kaj nacia heredaĵo al Roman

Dobrzyński. Ne mankis la romkatolika meso en Esperanto, kaj la naskiĝtaga kuko de Ludoviko por festi lian... kaj ankaŭ mian naskiĝtagon (la 10an de decembro, ankaŭ la tago pri homaj rajtoj).

La tuto estis organizata de BES, la bjalistoka grupo, ĉefe danke al Nina kaj Przemek kaj la tuta loka grupo.

**Laura Brazzabeni**

## Ĉeeste kaj virtuale en Hangzhou

La 13an de decembro Zhejiang-a Esperanto-Asocio okazigis kunvenon en Hangzhou, ĉefurbo de la provinco Zhejiang. La kunveno funkciis ĉeeste kaj virtuale.

Qiu Xirong, la prezidanto de la asocio, faris paroladon pri la atingoj de la asocio dum la 2022 kaj pri la taskoj plenumindaj en la venonta jaro. Li emfazis, ke la asocio povos ludi gravan rolon dum la Azia Sport-kunveno venontjare okazonta en Hangzhou. Por pli vaste disvastigi Esperanton, la arta grupo de la asocio multe aktivis en diversaj urboj de la provinco kaj gajnis multe da aplaŭdoj. Post du tagoj venos la 163a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, la kunveno okazis ankaŭ por celebri la feston.

Fine de la kunveno la partoprenantoj lernis la paroladon de la ĉina prezidanto Xi Jinping, faritan en la 20a Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.

**Qiu Xirong, Xu Jinming**





## Sankt-Peterburgo: Omaĝe al Zamenhof kaj Haazen

La 24an de decembro en la Peterburga biblioteko №1 (strato Torĵkovskaja) estis aranĝita kunveno okaze de la 163a naskiĝdatreveno de Zamenhof, organizita de la Esperanto-klubo *Kariljono*.

En la programo estis malfermo (Svetlana Ejst), festparolado “Harmonio en la Esperanto-movado” de Jozef Haazen, unuakta teatraĵo *Venko de Maljunuloj-rabistoj*, du filmetoj, transdono de honoraj diplomoj al aktivuloj, gratulado de la jubileanto Haazen. Inter la programeroj okazis prezentoj de la ensemblo *Blua Ponto* sub la gvido de Artjom Sorokin, la programon gvidis Oksana Burkina.

Funkciis ekspozicio kaj libroservo, kaj fine estis komune kantita la Esperanto-himno *La Espero*.

Sekvatage oni daŭrigis festi la jubileon de Jozef Haazen en la fortikaĵo de S-taj Petro kaj Paŭlo kun kariljona koncerto, spektado de filmo pri la kariljonado kaj Haazen, prezento de nova libro, teremina (thereminvox) koncerto de Olesja Rostovskaja. La festado finiĝis en kafejo.

Laŭ informoj en *Vkontakte*

Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

## Mondpokalo 2022: Esperanto sur la pilkoj



La germana sportfirmao Adidas kaj FIFA (Federacio Internacia de Futbalo Asocia) elektis utiligi Esperanton kiel unu el la lingvoj aperantaj sur la oficialaj pilkoj de la Futbala Mondpokalo 2022.

“Al Rihla”, la oficiala nomo de la pilko, signifas “la vojaĝo” en la araba. Fabrikata ekde marto 2022 de Adidas, ĝi kombinas elementojn de la kulturo de Kataro al novaj teknikoj kaj nuntempaj valoroj, kiel daŭripoveco kaj internacieco. Laŭ FIFA la dezajno estas inspirita de la kulturo, arkitekturo, boatoj kaj flago de Kataro, dum la blua, ruĝa kaj flava kolorskemo reprezentas la pejzaĝon de la lando. Krom la tre specialan dezajnon, “Al Rihla” havas teknologion, kiu plibonigas la video-asistan arbitracion per detalaj datumoj pri la movo de la pilko – kaj ĝi estas la unua oficiala pilko de FIFA fabrikata per naturmediamikaj materialoj, kiel gluoj kaj inkoj surbaze de akvo. Aldone, sur ses el la triangulaj pecoj de la pilko aperas la mesaĝo: “FUTBALO ESTAS – KOLEKTIVA – RESPONDECO – PASIO – RESPEKTO – TEAMLABORO – HONESTECO”.

La teksto aperas en la angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj Esperanto. La unuaj kvin estas inter la oficialaj lingvoj de UN. La angla, araba, franca kaj hispana aldone ankaŭ estas inter la oficialaj lingvoj de FIFA. La inkluzivon de Esperanto sur la pilko iniciatis la direktorino de dezajno de Adidas, Franziska Loffelmann, laŭ informo de la revuo *Esperanto*.



“Al Rihla” estis uzita en la 60 unuaj matĉoj de la mond-pokalo. La 11an de decembro 2022 FIFA rivelis alian pilkon, por speciala uzo dum la duonfinaloj kaj finalo, “Al Hilm”, kies nomo signifas “la revo”. La teknikaj aspektoj de la pilko estas la samaj de “Al Rihla”, sed la dezajno baziĝas sur teksturita ora, ruĝa kaj viola bazkoloroj kun subtila triangula ŝablono, inspirata de la brilantaj dunoj de la dezertoj ĉirkaŭ la urbo Daŭho, de la koloro de la mond-pokala trofeo kaj de la ŝablono de la katara flago. Denove aperas la samaj lingvoj kiel sur “Al Rihla”, sed kun alia teksto kaj en alia agordo: ĉi-foje legeblas nur la vorto “KUNE” centre en la araba, kun la ekvivalentoj en la angla, ĉina, Esperanto, franca kaj hispana ĉirkaŭe. Ambaŭ pilkoj estas aĉet-eblaj ĉe retbutikoj de Adidas.

Pluraj esperantistoj sukcesis uzi la novaĵon pri “Al Rihla” por informi pri Esperanto, en personaj retoj aŭ per agado ĉe gazetaroj. UEA gratulas al tiuj kaj kuraĝigas ĉiujn daŭre reprodukt(ig)i la informojn nacilingve ankaŭ okaze de la apero de Al Hilm. UEA rememorigas, ke Tutmonda Esperanta Futbala Asocio (TEFA), kvankam ne aliĝinta al FIFA, estas ekde 2014 membro de la NF-Ligo (ne-FIFA-Ligo), kiu kunigas teamojn de neagnoskitaj ŝtatoj, de minoritataj grupoj aŭ senŝtatajn teamojn, kiel la futbalteamon “Esperanto” de TEFA mem. En 2015 TEFA kaj NF-Ligo kreis la

pokalon “Zamenhof”, omaĝe al la iniciatoro de Esperanto. La ludoj de la futbalteamo “Esperanto” okazis dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto, ĉiujare de 2014 ĝis 2019, interrompitaj pro la pandemio. Sed ankoraŭ ĉi-jare okazos futbalmatĉo inter loka teamo kaj esperantista teamo dum la 8a Afrika Kongreso de Esperanto, fine de decembro en Senegalio. La matĉo uzos “Al Rihla”.

UEA kaj TEFA gratulas al Adidas kaj FIFA pro la elekto utiligi Esperanton, kio honorigas la tutmondan Esperanto-komunumon kaj bele pruvigas, ke Esperanto ja situas inter la konsiderindaj internaciaj lingvoj. UEA ankaŭ gratulas al ĉiuj teamoj, kiuj partoprenis la Mondpokalon 2022, speciale al la kvar duonfinalistoj, per kiuj la komisionoj de UEA Amerika (Argentino), Eŭropa (Francio kaj Kroatio), Afrika kaj MONA (Maroko) sentas sin reprezentitaj – kaj aparte bondeziras al la 2 finalistoj. Fine UEA bondeziras al la mondfama brazila futbalisto Pelé, kiu subtenis Esperanton, deklarante, ke “Esperanto estos ĝenerale tre utila al sportistoj por interproksimigi ilin kaj faciligi por ili amikajn kaj sportajn interrilatojn”. Nuntempe 82-jara, Pelé estas enhospitaligita. Ekde 2021 li batalas kontraŭ kancero kaj lastatempe suferas spirkomplikaĵojn pro KOVIM-19: kuracistoj tamen raportis pri pliboniĝo de lia situacio.

**GK UEA**

## **Panteono por ... vivantaj herooj**

Okaze de la 21a naskiĝtago de la paĝaro Edukado.net ni denove festas per premiado de personoj, kies agado en tiu ĉi jaro aŭ dum vivlongo multe kontribuis al la instruado kaj disvastigo de nia lingvo. Ni kreis PANTEONON por hejmigi en unu loko niajn heroojn.

Nia Panteono estas ne nur por forpasintoj, sed ankaŭ vivaj aktivuloj povas eniri ĝin kun memverkitaj biografioj, honorataj la 15an de decembro. Do, estas ĝuste ili, kiuj jam scias la ĝojigan novaĵon kaj nun venas la vico de la movadanoj, kiuj povas ekkoni, kiujn ni elektis ĉi-jare por la premioj.

Ni havas entute 12 novajn panteonanojn. Ili devenas el 11 landoj, kaj agadas same en 11 landoj, sed ne nepre tie, kie ili naskiĝis. (Ofta fenomeno en Esperantujo). Tute ne tipe, sed en 2022 temas nur pri tri virinoj, sed ni trankviligas vin, ke la genra proporcio inter la 276 enpanteonaj personoj estas multe pli ekvilibrita:

Araceli Aguilar y Aguilar (Meksiko), Věra Barandovská-Frank (Ĉeĥio-Germanio), Anthony Bodineau (Francio-Britio), Hervé Gonin (Francio), Grant Goodall (Usono), Alessandra Madella (Italio-Ĉinio), Sun Mingxiao (Ĉinio), Martin Ptasieński (Pollando-Germanio), Nitta Takamichi (Japanio), Marc van Oostendorp (Nederlando), Josef Vojáček (Ĉeĥio), César Dorneles Soares (Brazilo).

Legu pli pri la novaj panteonanoj kaj gratulu ilin en la retejo <https://edukado.net/novajhoj?id=883>.

Laŭ edukado.net



R. Dobrzyński dekorita en Bjalistoko (Foto: FB de A. Sochacki)

## Pollanda ministeria medalo por Roman Dobrzyński

Danke al iniciato de Pola Esperanto-Asocio (PEA) la 10an de novembro 2022 la ministro pri kulturo kaj nacia heredaĵo de Pollando, Prof. Hab. D-ro Piotr Gliński, decidis aljuĝi al la fama pola esperantisto Roman Dobrzyński gravan ministerian distingon: la bronzan medalon Merita por Kulturo “Gloria Artis”. En sia propono PEA emfazis la signifan kontribuon de Dobrzyński por popularigado de kulturo ĝenerale kaj liajn meritojn kiel prezidanto de PEA, kiam en 1987 li ĉeforganizis la plej grandan Universalan Kongreson, en Varsovio; kaj kiel televida raportisto, pro kio li atestis gravajn historiajn eventojn kaj realigis ĉ. 300 dokument-filmojn.

Roman Dobrzyński naskiĝis en 1937 kaj esperantistiĝis en 1955. Li magistriĝis pri juro kaj poste pri ĵurnalismo per tezo pri la Esperanta gazetaro. Kiel studento li aktivis en la Esperanto-movado per verkado, redaktado kaj instruado, kaj kiel estrarano de Pola Esperanto-Junularo. Li estis vicprezidanto de TEJO (1966-68) kaj redaktoro de *Kontakto* (1968-70). De 1973 ĝis 2003 li laboris kiel ĵurnalisto de Pola Televido kaj en tiu rolo multfoje traktis Esperanto-rilatajn temojn, farante ankaŭ filmojn pri Esperanto, ekz-e *Bona Espero* (1984).

Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

# *Tribuno*



Je la jarŝanĝo Paweł Fischer-Kotowski pretigis nian tradician “Rondan Tablon” pri la (mal)atingoj en Esperantujo dum 2022. Ĉi-jare altablîgis dek internacie konataj aktivuloj:

Peter Baláž (Slovakio), Hans Becklin (Usono),  
Albert Stalin Tancinco Garrido (Filipinoj/Hispanio),  
Arko Gong Xiaofeng (Ĉinio), Dennis Keefe (Usono/Hispanio),  
Ilona Koutny (Pollando), Anna Löwenstein (Britio),  
Ahmad Reza Mamduhi (Irano), Vinko Markovo (Francio)  
kaj Spomenka Ŝtimec (Kroatio).

*Al ili kaj al ĉiuj niaj legantoj kaj kunlaborantoj ni deziras  
Bonan jaron 2023!*

# Niaj atingoj kaj malsukcesoj dum 2022


Ankaŭ ĉi-jare *La Ondo de Esperanto* petis diverstendencajn aktivulojn respondi la tradician demandon: “Kiu(j) Esperanto-evento(j) en la jaro 2022, laŭ via opinio, estas la plej pozitiva(j) kaj la plej negativa(j)?”. Ni ricevis respondojn de dek personoj, kiujn ni dankas pro la kontribuoj al nia “Ronda Tablo”.

**Peter Baláž (Slovakio)**

**Kunordiganto de E@I**

Pozitivaĵoj: Finfine re-okazigo de UK kaj IJK, kiuj ambaŭ sukcesis (UK kun relative multaj novuloj kaj gejunuloj). Brila teatraĵo “1910” prezentita dum UK en Montrealo (spektebla en YouTube). Bonega TEJO-muzikalo “June kaj kune” (ankaŭ spektebla en YouTube). Okazigo de aldona, jam la 3a VK (Virtuala Kongreso) – eble nasko de tradicio de ĉiujara aŭtuna tutmonda reta evento. Eldono fare de EAB de la impona vivo-verko de M. Boulton: “Unu animo homa” kaj ekzempla eldonagado de EAB pri serio de belegaj fabellibroj.

Negativaĵoj: Malemo membriĝi, agi kune = malmulta “komuneco” = emo je kunlaboro, kunagado; troa individuismo – kio eĉ pli videblas, kiam la membroj de asocioj malmultiĝas (ne temas pri lastjara fenomeno, sed ĝi eble eĉ plifortiĝis dum la pandemiaj/izolaj tempoj).




**Anna Löwenstein (Britio)**

**Verkisto, redaktoro de uea.facila**

Bedaŭrinde ĉi tiu ne estis bona jaro por pozitivaj atingoj. La plej interesa evento laŭ mi estis la virtuala kongreso en novembro. Per la VK eĉ esperantistoj, kiuj normale ne povas permesi al si vojaĝi eksterlanden, havis la eblecon partopreni en Universala Kongreso. Tio estas nepre ripetinda evento, kaj kvankam la organizado ankoraŭ ne estas perfekta, sendube oni gajnos pli da sperto en estontaj jaroj.

Granda senluziigo estis la malapero de la ĉinlingva Esperanto-kurso, kiu jam estis preskaŭ preta, el la retejo de Duolingo. Duolingo ne plu interesiĝas pri volontula kunlaborado, kaj klare montras, ke ĝiaj celoj estas pure komercaj. La multaj kursoj en amaso da lingvoj ankoraŭ ekzistas, sed ne plu eblas ĝisdatigi ilin. Estonte Duolingo okupiĝos nur pri la grandaj profitdonaj lingvoj. La aliaj, kiel Esperanto, rajtos pluekzisti, sed pro manko de ĝisdatigo, fermado de la diskutpaĝoj, kaj forviŝo de la gramatikaj klarigoj, iom post iom ili povos nur degeneri.





**Ilona Koutny (Pollando)**  
**Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj**  
**ĉe la Universitato Adam Mickiewicz**

En 2022 la pandemio mildiĝis, tiel eblis jam renkontiĝi surloke, kio estas grava por personaj kontaktoj, sed restis ankaŭ la eblecoj de reta aliĝo al la eventoj (ekzemple. al la Montreala UK aldoniĝis la Virtuala Kongreso), tiel ni povis vere ĝui grandskale Esperanton. La ekfunkciado de la C2-nivelo de la KER-ekzameno estis granda paŝo por serioze trakti esperanton.

La postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj (en la universitato Adam Mickiewicz, Poznano) travivas sian 25an jaron kun rekorde granda, varia kaj altnivela grupo. Aperis la dua lernolibro de la studoj “Esperanta kulturo” (kun kontribuo de kolegoj kaj studentoj, redaktita de mi). Startis la unikaj internaciaj magistras studoj pri interlingvistiko en AMU kun partopreno de ĉinaj studentoj, kie anglalingvaj kursoj pri informadiko kompletigas la baze esperantlingvan programon pri lingvistiko kaj kulturo.

Alvenis malbona novaĵo pri la fermo de la Centra Oficejo, kio malpliigas la prestiĝon de UEA. Pli malbonega estas la milito en Ukrainio kiu gvidis al konfliktoj ankaŭ ene de la pacema esperantista komunumo.



**Ahmad Reza Mamduhi (Irano)**  
**Vicprezidanto de Irana Esperanto-Asocio**  
**Prezidanto de ILEI**

La plej pozitiva atingiĝo de 2022 estas tio, ke ni pli profunde aprezis la potencon de la virtuala mondo kaj ĝian pli fortan atingivon. Ja en 2020 kaj 2021 ni devige okazigis plejmultajn kunvenojn kaj kongresojn virtuale, tamen en 2022 eĉ kiam/kie eblis okazigi ilin nur fizike, ni preferis aŭ hibridan aŭ tute virtualan formon. Ĉi-foje ne nur pro la pandemio, sed (ankaŭ) pro aliaj – eble eĉ pli ampleksaj – fakt(or)oj kiel ekonomia divido, moviĝaj baroj, politikaj problemoj k. s.

Ankaŭ la plej negativa afero en 2022 rilatas al la virtuala mondo: temas pri cifereca fendo/divido! Dum por multaj utiligado de la reto kaj ĝiaj eblecoj estas kiel denaskaj kapablo kaj rajto, por multaj aliaj tio neniel validas. Feliĉe, pereigado – aŭ almenaŭ mallarĝigado – de la cifereca fendo estas multe pli facile venkebla defio ol la ekonomiaj, geografiaj, politikaj k. a. defioj! Mi esperas, ke en 2023 ni povos trovi mekanismo(j)n kontraŭ tiu ĉi fendo!



**Iĝu amiko de “La Ondo de Esperanto”!**

## “Arko” Gong Xiaofeng (Ĉinio)

### Vicprezidanto de ILEI

### Prezidanto de Ĉina Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Jen la pozitivajoj pri 2022:

Poznano lanĉas dujarajn magistrajn studojn pri interlingvistiko.

Startis la unikaj magistraj studoj pri interlingvistiko en AMU kun la ĉinaj gestudentoj. Startis la dujara magistra programo kiel specialiĝo kadre de studdirekto lingvistiko kaj informmastrumado.

Lanĉiĝis la C2-nivelo de KER-ekzamenoj.

La KER-Ekzamena Centro ellaboris novan nivelon kaj kreis la retajn ekzamenblojn. Al la C2-nivelo aliĝis entute 46 personoj, kadre de la 10a Tutmonda Ekzamentago, la 26-an de novembro. Ekzameniĝis fine 31 (67%) el kiuj sukcesis 26 kandidatoj (84%). La unuan fojon okazis rete je C2-nivelo.

Sukcesis la 3a Virtuala Kongreso de Esperanto.

Sekve de la du sukcesaj Virtualaj Kongresoj okazintaj en 2020 kaj 2021, ĉi-jare UEA sukcese organizis la 3an Virtualan Kongreson kvartage fine de novembro. Tiu ĉi sukcesa modelo estas laŭdinda kaj eventuale povus fariĝi konstanta aranĝo, supleme al la UK.



## Albert Stalin Tancinco Garrido (Filipinoj/Hispanio)

### Prezidanto de TEJO

Pli ol du jarojn post la komenco de la kronviroza pandemio, la movado komenciĝis denove moviĝi antaŭen en plena rapideco: denove okazis ĉeeste la IJK en Nederlando kaj UK en Kanado, same kiel multaj aliaj landaj kaj regionaj kongresoj. Flanke de TEJO, ni superis, unuafoje en pluraj jaroj, pli ol mil individuajn membrojn, dank' al aparte tre sukcesaj Virtuala Kongreso kaj Retoso, kun pli ol 1400 aliĝintoj, reta hispanlingva enkonduka kurso kun plurdekoj da varbitoj, kaj viglaj varbaj kampanjoj de UEA kaj TEJO.



**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Arkivo



Sur la supra foto, farita en REVU-16, okazinta antaŭ 45 jaroj, la 6-8an de novembro 1977 en Ĉeljabinsk, estas kelkaj tiutempaj Uralaj aktivuloj: Sergej Pavlenko (prezidanto de EK en Magnitogorsk), Aleksander Korĵenkov (Tjumeno), Gafur Gazizi (= Afu Trigo, Esperanto-poeto el Baŝkirio), Aleksander Lobastov (prezidanto de EK en Salavat), Anatolij Kim (Tjumeno), Miĥail Kovaljov (Miass). *Vd. p. 68-69.*

# Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2023

5. Antaŭ 70 jaroj naskiĝis **Stanislav Marček** (1953-1965-), slovaka teknikisto, eldonisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel Stano Marček; Esperanto-instruisto, prezidanto de Slovaka Esperanta Federacio (2000-16), kiel manaĝero de la populara ĉeĥoslovakia muzika grupo *Team* prizorgis eldonon de ĝia albumo en Esperanto (1989) kaj preparis ĝiajn Esperanto-konzertojn; redaktoro de la revuoj *Esperantisto Slovaka* (1985-95), *Esperantista Vegetarano* (1982-97), *Heroldo de Esperanto* (2000-01), *Esperanto* (2002-13), *Juna Amiko* (2013-), *Esperanto aktuell* (2011-); aŭtoro de *Krucenigmoj kaj humuro en Esperanto* (1977), *Instrua amuzo* (1979), *107 krucenigmoj en Esperanto* (2008), *Aŭdo-vida konversacia kurso de Esperanto* (DVD, 2006), *Kantoj por kursoj* (KD, 2010) kaj de la internacia ilustrita lernolibro *Esperanto per rekta metodo* kiu ekde 2006 aperis en pli ol 40 lingvoj; voĉleginto kaj eldoninto de pluraj sonlibroj; membro de la Akademio de Esperanto (AdE, 2010-); laŭreato de la premio Deguĉi (2014).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 191-193).

9. Antaŭ 110 jaroj naskiĝis **Miyamoto Masao** (1913-1934-1989), japana socia aganto kaj esperantisto, la plej konata japana Esperanto-literaturisto, aŭtoro/tradukinto de pli ol 20 libroj en/pri Esperanto, i.a.: *Pri arto kaj morto* (novelaro, 1967), *Invit' al japanesko* (poemaro, 1971) kaj *Sarkasme kaj entuziasme* (esearo, 1979); kvar liaj tradukoj el la japana literaturo aperis en la libroserio "Oriento-Okcidento"; membro de AdE (1986-89), honora membro de UEA (1984).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 204-206).

10. Antaŭ 145 jaroj naskiĝis **Theodor Ĉejka** (1878-1899-1957), ĉeĥa instruisto kaj esperantisto, aŭtoro kaj kunaŭtoro de pluraj Esperanto-lernolibroj kaj vortaroj por ĉeĥoj, instruisto de Esperanto, eldoninto de *Revuo Internacia*, *Germana Esperantisto*, *Bohema Esperantisto* kaj *Internacia Pedagogia Revuo*, membro de la Lingva Komitato ekde ties fondo (1905) ĝis 1923.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 64-65).

12. Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Lucien Bannier** (1893-1906-1986), franca bankoficisto kaj esperantisto, kunfondinto (kun Lanti kaj Glodeau) de SAT, dum pli ol 60 jaroj membro de la gvidorgano (nun: plenumkomitato) de SAT, ĝenerala sekretario kaj prezidanto de la plenumkomitato de SAT (1935-68, kun paŭzo dum la Dua Mondmilito), administranto de la eldonado de PV (1930) kaj de PIV (1970), kompilinto de *Leteroj de E. Lanti* (1940), kunverkinto de *Historio de SAT* (1953). Oni ofte nomis lin "La konscienco de SAT".

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 24-25).

14. Antaŭ 65 jaroj mortis **Paul Nylén** (1870-1902-1958), sveda ĵurnalisto kaj esperantisto, redaktoro de la dua Esperanto-gazeto *Lingvo Internacia* (1897-1901), kunfondinto (1922) kaj estrarano de Sveda Esperanto-Instituto; prezidanto (1918-21, 1924-34), afergvidanto (1923-24) kaj honora prezidanto (1921-23, 1934-58) de Sveda Esperanto-Federacio, membro (1908-58) kaj vicprezidanto (1933-37) de AdE, aŭtoro de Esperanto-lernolibroj kaj vortaroj, i.a. de la sveda versio de la Esperanto-ŝlosilo de Ĉefeĉ (1906), kiu havis 20 eldonojn.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 216-217).

14. Antaŭ 60 jaroj naskiĝis **Mao Zifu** (1963-1986-), ĉina instruisto kaj esperantisto, unu el la plej gravaj nuntempaj poetoj en Esperanto, aŭtoro de *Ŝanĝado* (poezio, 1997), *Kantoj de Anteo* (poezio, 2006), *Amoro sen oro* (prozo, 2009), *Taglibro de Anteo 2009-2011* (prozo kaj poezio, 2011), *Metaforoj senapostrofaj* (2014); tradukinto de *La Espera Vojo* de Chen Haosu (2009); membro de AdE (2022-); laŭreato de la premio Grabowski (1997).

15. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Itô Kanzi** (1918-1959-2005), japana eldonisto kaj esperantisto, aŭtoro de okvoluma japanlingva romano pri Zamenhof (1967-83); kolektinta kaj editorinta kun la pseŭdonimo Ludovikito (Ludoviko + Ito) verkojn kaj tradukojn de Zamenhof, aliajn tiutempajn dokumentojn, presaĵojn kaj leterojn kadre de la 58-voluma eldonprojekto konsistanta el tri libroserioj; honora membro de UEA (1990), laŭreato de la Esperanto-Kulturpremio de la urbo Aalen kaj FAME-Fondaĵo (1991).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 139-140).

17. Antaŭ 155 jaroj naskiĝis **Louis Couturat** (1868-1914), franca filozofo, interlingvisto kaj idisto, iniciatinto kaj fakta gvidanto de la Delegacio por akcepto de la lingvo internacia (1901), kunaŭtoro (kun Léopold Leau) de la fundamentaj interlingvistikaj studoj *Histoire de la langue universelle* (1903) kaj *Les nouvelles langues internationales* (1907), la ĉefa aŭtoro de la planlingvo Ido (1907).

22. Antaŭ 15 jaroj mortis **Claude Piron** (1931-1942-2008), belga, poste svisa tradukisto, psikanalizisto, psikoterapiisto, poligloto kaj esperantisto; kunfondinto kaj la unua prezidanto de Esperanto-klubo ĉe UN en Novjorko (1958), redaktoro de *Svisa Espero* (1963-66), kunfondinto (1979) kaj prezidanto de Internacia FERIA Altlernejo de KCE; aŭtoro de pluraj artikoloj kaj libroj pri Esperanto kaj internacia komunikado (*Esperanto: Ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?*, 1977; *Psikologiaj reagoj al Esperanto*, 1988; *La bona lingvo*, 1989; *Le défi des langues*, 1994 k. a.; originala poemaro *Malmalice*, 1977). Grandan popularecon ĝuis liaj kvar krimromanoj en la t. n. "Ĉu-serio" (1976-82), kiuj aperis kun la pseŭdonimo Johán Valano same kiel la

krimnovelaro *Ĉu rakonti novele* (1986), la priseksa krimromano *Ĉu ŝi mortu trafike* (pseŭdonimo Johán Balano, 1982) kaj, precipe, lia lingvoinstrua romaneto *Gerda malaperis* (1983), multfoje represita kaj aperinta ankaŭ kiel sonlibro (2005) kaj filmo (2006). Honora membro de UEA (1998), trifoja laŭreato de la premio La Verko de la Jaro, laŭreato de la premio Onisaburo Deguĉi (1994) kaj de la OSIEK-Premio (1998).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 229-232).

**27.** Antaŭ 30 jaroj mortis **Juan Régulo Pérez** (1914-1932-1993), hispana instruisto kaj esperantisto, konsiderata kiel la plej grava Esperanto-eldonisto, kiu dum 1952-76 kadre de la serio *Stafeto* aperigis 94 librojn kun sume 19.302 paĝoj; inter ĉi tiuj libroj estis *Kvaropo* de W. Auld, J. S. Dinwoodie, J. Francis, R. Rossetti (1952); *Kontralte* de M. Boulton (1955); *La infana raso* de W. Auld (1956); *Esperanta antologio* (1958); *Lingvo kaj vivo* de G. Waringhien (1959); *Ŝtupoj sen nomo* de B. Ragnarsson (1959); *Kiel akvo de l' rivero* de R. Schwartz (1963); *33 rakontoj* (1964); *Proverbaro Esperanta* de L. Zamenhof (1974) k. m. a.; membro de AdE (1953-93).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 239-241) kaj en la artikolo *Juan Régulo Pérez* de Aleksander Korĵenkov <https://sezonoj.ru/2018/01/regulo>.

**29.** Antaŭ 120 jaroj naskiĝis **Asen Grigorov** (1903-1921-1985), bulgara ĵurnalisto, socia kaj politika aganto (i.a., sekretario de Georgi Dimitrov tuj post la Dua Mondmilito) kaj esperantisto, konata en Esperantujo ankaŭ kiel Marin Ljubin; aktivulo de la intermilita laborista Esperanto-movado; ĉefredaktoro de *Internacia Kulturo* (1945-49) kaj *Nuntempa Bulgario* (1957-71); aŭtoro de la kelkfoje reeldonitaj Esperanta-bulgara (1930) kaj bulgara-Esperanta vortaroj (1931) kaj aliaj lerniloj; aŭtoro de *Garbo* (1930), *Ruĝa aŭroro* (1930), *La himno* (1931), *Gardu la Pacon!* (1980); tradukinto de *Lev Tolstoj kaj la universala vero* de I. Gorbunov-Posadov (1927), *Vilaĝo Borovo* de K. Velkov (1983), *La glacikovrita ponto* de L. Stanev (1984), *Ŝtelisto de Persikoj* de E. Stanev (1985) k. a.; kompilinto kaj kuntradukinto de kelkaj antologioj.

**Aleksander Korĵenkov**





Novembro 1977. Grupo da partoprenantoj (ĉirkaŭ duono) de REVU-16 en neĝoplana Ĉeljabinsko.

## Kronikisto: Du plonĝoj en la pasintecon

Ĉi-aŭtune en la blogo “Kronikisto”, kiun la redaktoro de “La Ondo de Esperanto” kreis por publikigi (foto)rememorojn pri sia esperantista vivo, aperis du pliaj tekstoj.

La unua artikolo “Осень 1977: Снова колхоз. Я заговорил! REVU в Челябинске. Итоги года” (Aŭtuno 1977. Denove kolĥozo. Mi ekparolis. REVU en Ĉeljabinsko. La rezultoj de la jaro) estas dediĉita al la kvar lastaj monatoj de la 1977a jaro. En septembro la aŭtoro, tiam 19-jara, rakontas pri la ĉiutaga Esperanto-praktikado kun Viktor Zaĥarov dum la septembra kamplaboro (tiutempe oni devige sendis la Sovetuniajn studentojn kiel helpantojn en “La batalado por rikolto”), pri la postvilaĝa reaperero en la klubo, kie li kun mirego komprenis, ke li jam povas libere paroli Esperanton, kaj pri la renkontiĝo REVU-16 en Ĉeljabinsko (Suda Uralo). Fine li resumas sian privatan kaj esperantistan vivon dum 1977 kaj rememoras kelkajn mondajn eventojn el ĉi tiu malproksima jaro.

Ĉi tiun artikolon garnas 15 fotoj kaj tri skanitaj artikoloj. Legu kaj komentu ĝin ĉe <https://kronikisto.livejournal.com/3429.html>.

En sia dua blogaĵo “Тюменский клуб. Монструозное словечко. Готовимся к поездке в Алтайский край” (La Tjumena klubo. Monstra vorto. Prepariĝo al la vojaĝo al Altaĵo) Aleksander Korĵenkov skizas la historion de la Tjumena junulara



Esperanto-klubo "Revo" kaj de ties klubejo en la fer-vojista kulturpalaco. Poste la Ondisto prezentas la staton de la klubo post la forveturo de la studentoj, fondintaj la klubon en 1973 (kutimaĵo por ĉiu junulara klubo en provinco), la novan aktivularon, la tradician dutagan majan eksterurbiĝon (jen la monstra vorteto, aludita en la titolo, kiu donis la motivon prezenti la Esperantan vortfaradon) "Galanto-78", kaj la pre-paraĝadon al la somera tendaro OrSEJT-20 (Altajo, aŭgusto 1978).

La artikolo enhavas naŭ arkivajn fotojn, du skan-itajn artikolojn kaj unu bildkarton. Legu kaj komentu ĝin ĉe <https://kronikisto.livejournal.com/3735.html>.

La du dekduoj da fotoj, publikigitaj en ĉi tiuj arti-koloj, vidigas konatajn tiutempajn Uralajn aktivulojn: Vera Dobrydina (Miass), Gafur Gazizi (Ĉismy, Ufa, Salavat), Vladimir Izosimov (Tjumeno), Boris Kolker (Ufo, Klev-lando), Aleksander Korĵenkov (Tjumeno, Jekaterinburgo, Kaliningrado), Diljara Mametova (Tjumeno, Tobolsko), Ludmila Novikova (Miass, Moskvo), Valentina Samojlovskaja (Tjumeno, B. Sorokino, Taganrog), Aleksandr Ŝarov (Permo), Na-deĵda Ŝeveljova (Tjumeno), Viktor Vjazovcev (Salavat), Viktor Zaĥarov (Tjumeno, Usinsk, Sankt-Peterburgo) kaj multajn aliajn.

Nun en la blogo "Kronikisto" estas 14 tekstoj kaj 207 ilustraĵoj. La vizitantoj skribis 251 komentojn.

Legu, spektu kaj komentu la publikaĵojn en "Kronikisto":  
<https://kronikisto.livejournal.com>.

AIKO



## Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Verkis: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonis: *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj


Prezo: 30 eŭroj

Mendu ĉe via kutima libroservo

<http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120htm>



# *Kulturo*



Post la verkoj de Ivan Bunin (marto), Aleksandr Kuprin (junio) kaj Maksim Gorjkij (septembro), en nia literatura projekto “Rusa Novelaro 2”, en kiu aperas mallongaj prozaĵoj de rusaj aŭtoroj de la 20a jarcento, aperas ses verkoj de Fjodor Sologub.

# *Mi prenas pecon da vivo...*

“Mi prenas pecon da vivo, kruda kaj mizera, kaj kreas el ĝi dolĉan legendon, ĉar mi estas poeto. Stagnaĉu en obskuro vi, senbrila, ĉiutageca, aŭ ŝtormu kiel furioza incendio, – super vi, vivo, mi poeto, konstruos legendon, kreatan de mi pri l’ o ĉarmega kaj splenda”, – per ĉi vortoj Fjodor Sologub komencis sian romanon *La sorĉoj de mortintoj* (Навьы чары), kiu laŭ la pluverkado transformiĝis al *La kreata legendo* (Творимая легенда).

La kvara parto de RuNo-2 enhavas verkojn de Fjodor Sologub, elstara rusa simbolisma poeto, popularega ankaŭ pro la romano *La eta demono*, konata al la legantoj de *La Ondo* per fragmentoj aperintaj en la serio *Dek rusaj romanoj* (LOdE, 2019, №292), sed nur malmultaj konas kaj ĝuas liajn rakontojn, novelojn, fabelojn kaj legendojn.

Senbrila, obskura kaj ĉiutageca estis la unua jartrideko de lia vivo. Fjodor Kuzmiĉ Teternikov (Фёдор Кузьмич Тетерников) naskiĝis la 17an de februaro (Gregorie: la 1an de marto) 1863 en la familio de Peterburga tajloro, post kies frua morto (1867) la patrino de Fjodor dungiiĝis kiel servistino ĉe la familio Agapov, ricevinte loĝlokon en ilia domo, kie ekloĝis ankaŭ Fjodor kaj lia fratineto. Feliĉe, la kuiristina filo ricevis tie ne nur mokojn kaj batojn de la patrino kaj mastrino, sed ankaŭ aliron al la hejma biblioteko kaj eĉ (maloftajn) vizitojn al Peterburgaj teatroj. Malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj li multe legis kaj bone lernis, kaj estis senpage akceptita al la Peterburga instruista instituto, en kies internulejo li vivis ĝis la diplomiĝo en 1882.

Sekvis dekjara instruista laboro en provincaj urboj, kie li plu loĝis kun siaj senrimedaj patrino kaj fratino. Nur en 1892 li ricevis instruistan oficon en Peterburgo. Sed ni ne daŭrigu la biografion, facile troveblan, ekzemple, en Vikipedio.

Kvankam liaj poemoj ekaperis en gazetaro ekde 1884, la populareco venis al li nur en Peterburgo pro verkoj aperintaj en *Severnyj Vestnik* (Norda Heroldo), kie ekde aprilo 1893 li ekuzis la pseŭdonimon Sologub, lasinte la aŭtentan familinomon por nefikciaj verkoj. En *Norda Heroldo* aperis liaj unuaj rakontoj *La ombroj*, *La vermo* kaj *Al la steloj*, kiuj en 1896 estis publikigitaj ankaŭ en lia unua novelaro *Ombroj*.

Cetere, Sologub, simile al simbolismaj poetoj, kompilis siajn novelarojn ne kronologie, sed kiel ciklojn, en kiuj aperis tekstoj diverstempe verkitaj, jam presitaj kaj tute novaj, sed proksimaj teme aŭ motive, kaj tiucikle ili aperis en lia 20-voluma “plena” verkaro, ekzemple: *La pikilo de morto*, *La libro de fabeloj*, *La libro de disiĝoj*, *La libro de transformiĝoj* k. a. Eĉ pli: lia rakonto *Transformiĝoj* en *La libro de transformiĝoj* konsistas el kelkaj Tolstojece senornamaj vivhistorietoj, ideoj similaj al *Dika kaj magra* de Ĉeĥov, kaj tio estas nur eta ekzemplo de lia kreado.

En la nuna kolekto estas nur ses liaj rakontoj teme kaj stile malsamaj. Ni esperas, ke ili donas etan imagon pri la verkista talento de Sologub, malgraŭ la malfacilega tradukeblo de frazoj, kiuj foje ŝajnas implikitaj kaj komplikitaj eĉ al iuj el la rusaj legantoj. Ekde la sekva paĝo eklegu la frukton de nia rekreado de liaj rakontoj kaj legendoj.

**Aleksander Korĵenkov**

# Fjodor Sologub

## LA BELO

### I

En strikta silento de la vesperiĝanta tago Helena sidis sola, rekta kaj senmova, metinte sur la genuojn siajn blankajn, graciajn manojn. Sen klini la kapon ŝi ploris; grandaj larmogutoj malvigle fluis sur ŝia vizaĝo, kaj ŝiaj malhelaj okuloj feble briletis.

Hodiaŭ ŝi entombigis sian tenere amatan patrinon, kaj pro tio, ke al ŝi malplaĉis la laŭta aflikto kaj maldelikata partopreno de homoj en ĝi, ŝi dum la funebra ceremonio, kaj antaŭ ĝi, kaj poste, aŭskultante la kondolencojn, sin detenis de plorado. Ŝi finfine restis sola, en sia blanka ĉambro, kie ĉio estas virge pura kaj severa, kaj la malgajaj pensoj eligis senŝonajn larmojn el ŝiaj okuloj.

La robo de Helena, senornama kaj nigra, sidis sur ŝi malĝoje, – kvazaŭ, vestante Helenan per la tago de funebro, la senemocia vestaĵo ne povis ne reflekti ŝian ombritan animon. Helena estis rememoranta la mortintan patrinon, – kaj ŝi sciis, ke la antaŭa vivo, paca, klara kaj strikta, mortis por ĉiam. Antaŭ komenco de io alia Helena rememoris la paseon per la senpasiaj larmoj kaj senmova tristo.

Ŝia patrino mortis ne maljuna. Ŝi estis belega kiel diino de la antikveco. Ĉiuj ŝiaj movoj estis malrapidaj kaj majestaj. Ŝia vizaĝo estis kvazaŭ vualita per malgajaj revoj pri io perdita por ĉiam aŭ pri io aspirata kaj neatingebla. Ĝin delonge kovris densa paleco, antaŭdiranta la morton. Ŝajnis, ke la grandega laciĝo klinadis tiun ĉi belegan korpon al la eterna ripozo. La grizaj haroj inter la nigraj ĉiam pli rimarkeblis sur ŝia kapo, – kaj por Helena estis strange pensi, ke ŝia patrino baldaŭ estos maljunulino...

Helena ekstaris, aliris la fenestron kaj malrapide flankentiris la pezan kurtenon, por ke malaperu la krepusko, kiun ŝi malŝatis. Sed ankaŭ de tie, deekstere, griza kaj malhela duonlumo turmentis ŝiajn okulojn, kaj Helena denove eksidis sur sia loko kaj pacience atendis nigran nokton, kaj ploris per lantmovaj kaj senpasiaj larmoj.

Kaj finfine eknoktis, oni alportis lumon en la ĉambron, kaj Helena denove aliris la fenestron. Densa mallumo kovris la straton. Malriĉaj kaj krudaj objektoj de la teda ĉiutageco kaŝiĝis en la malhela kovraĵo de la nokto, kaj estis io solena en tiu ĉi malserena nigro. Kontraŭ la fenestro, ĉe kiu staris Helena, apenaŭ videblis en la alia flanko de la strato, en la lumo de maloftaj stratlanternoj, malgranda ruĝbrika domo de forĝisto. La lanternoj staris malproksime de ĝi, ĝi ŝajnis nigra.

Subite el la malfermita forĝejo al la pordego malrapide traflugis grandega ruĝa

fajrero, kaj la tenebro ĉirkaŭ ĝi kvazaŭ densiĝis, – la forĝisto portis en la strato pecon da inkandeska fero. Subita ĝojo ekbrulis en la animo de Helena kaj igis ŝin mallaŭte ekridi, – la sonora kaj ĝoja rido traigis la vastaĵon de la sensona trankvilo.

Kaj kiam la forĝisto preteriris kaj malaperis la ruĝa fajrero en la nigra tenebro, Helena ekmiris pro sia subita ĝojo, kaj ŝi ekmiris pro tio, ke ĝi, milde kaj treme, plu vivas en ŝia koro. Kial aperas, de kie venas tia ĝojo, eliganta ridon el la brusto kaj bruliganta fajrerojn en la okuloj, kiuj ĵus ploris? Ĉu la belo ĝojigas kaj emocias? Kaj ĉu ĉia apero de la belo estas ĝojiga?

La fulmrapida, naskita de la kruda substanco, ĝi preterflugis en la tenebro kaj estingiĝis, kiel decas por la belo aperi kaj vanui, plezurigante kaj ne satigante la okulojn per sia hela kaj efemera brilo...

Helena eniris en la senluman salonon, odorantan je jasmeno kaj vanilo, kaj levis la klavarklapon de la vostpiano; solenaj kaj simplaj melodioj ekfluis sub ŝiaj fingroj, kaj ŝiaj manoj malvigle moviĝis sur la blankaj kaj nigraj klavoj.

## II

Helena ŝatis resti sola inter la belegaj aĵoj en siaj ĉambroj, en kies dekoraj blanka koloro dominis, fajnaj kaj subtilaj aromoj ŝvebis en la aero, kaj eblis revii pri la belo tre facile kaj ĝoje. Ĉio bonodoris ĉi tie je apenaŭ distingeblaj aromoj: la vestaĵoj de Helena odoris je rozoj kaj violoj, la drapiraĵoj – je robinio; la florantaj hiacintoj elverŝadis siajn dolĉajn kaj melankoliajn odorojn. Librojn abundis, Helena multe legis, sed nur elektitajn kaj seriozajn verkojn.

Helena turmentiĝis apud la homoj, – la homoj mensogas, flatas, ekscitiĝas, esprimas siajn sentojn per troigaj kaj malagrablaj manieroj. La homoj havas multon absurdan kaj ridindan: ili obeas la modon, ili ial uzas fremdlingvajn vortojn, ili havas vantajn dezirojn. Helena estis singarda pri la homoj kaj sukcesis ekami neniun el tiuj, kiujn ŝi renkontis. Estis nur unu aminda homo: la patrino, ĉar ŝi estis trankvila, belega kaj verema. Helena deziris, ke ĉiuj homoj iam iĝu la samaj, kaj ke ili komprenu, ke estas nur la sola celo en la vivo – la belo, kaj ili aranĝu sian vivon digna kaj saĝa...

La lampoj brulis, – ilia lumo disfluis senmove klare kaj blanke. Odoris rozo kaj migdalo. Helena estis sola. Ŝi ŝlosis la pordon, bruligis kandelojn antaŭ la spegulo kaj malrapide senvestigis sian belegan korpon.

Tute blanka kaj trankvila, ŝi staris antaŭ la spegulo kaj rigardis al sia speguliĝo. Rebriloj de la lampoj kaj kandeloj kuris sur ŝia haŭto kaj ĝojigis Helenan. Ŝi staris milda, kvazaŭ ĵus ekflorinta lilio kun molaj, ankoraŭ nerektiĝintaj petaletoj, kaj senpeka skarlato ŝanĝbrilis sur ŝia virga korpo. Ŝajnis, ke la dolĉa kaj amara migdalaodoro, ŝvebanta en la aero, venas de ŝia nuda korpo. Dolĉa malkvieto senfortigis ŝin, kaj neniun malpura penso ĝenis ŝian virgan imagon. Kaj ŝi imagis kisojn tenerajn, kaj senpekajn, mildajn kiel tuŝado de la tagmeza vento, kaj ĝojajn kiel revoj pri beatego.

Ĝoja por Helena estis la nuda beleco de ŝia delikata korpo. Helena ridis, kaj ŝia mallaŭta rido sonis en la solena silento de ŝia serena loĝejo.

Helena ekkuŝis bruste sur la tapiŝon kaj estis enspiranta subtilan aromon de rezedo. Ĉi tie, malsupre, de kie estis strange rigardi al la malsupraj partoj de la objektoj, ŝi iĝis ankoraŭ pli gaja kaj ĝoja. Kvazaŭ malgranda knabino, ŝi ridis, ruliĝante sur la mola tapiŝo.

### III

Dum multaj sinsekvaj tagoj, ĉiuvespere Helena admiradis sian belecon antaŭ la spegulo, kaj tio ne lacigis ŝin. Ĉio estis blanka en ŝia ĉambro, – kaj meze de ĉi tiu blanko flagris skarlataj kaj flavaj tonoj de ŝia korpo, similaj al plej delikataj kolornuancoj de perlamoto kaj perlo.

Helena levis siajn brakojn super la kapo kaj, levante sin, etendiĝis, elaste fleksigis kaj balanciĝis sur la streĉitaj gamboj. La delikata elasteco de ŝia korpo gajigis ŝin. Ŝi ĝojis, rigardante kiel la fortaj muskoloj de ŝiaj belegaj gamboj elaste streĉiĝis sub la tenera haŭto.

Ŝi paŝadis tra la ĉambro nuda, staradis kaj kuŝadis, kaj ĉiuj ŝiaj pozoj, kaj ĉiuj ŝiaj lantaj movoj estis belegaj. Kaj ŝi ĝojis pro sia beleco kaj ŝi pasigis, senvesta, plurajn horojn, – jen revante kaj admirante sin, jen legante paĝojn de la bonegaj kaj striktaj poetoj...

Blankis bonodora likvo en cizelita arĝenta amforo: Helena miksis en la amforo aromojn kaj lakton. Helena malrapide levis la amforon kaj klinis ĝin super siaj elstaraj mamoj. Blankaj, aromoplenaj gutoj sensone gutis sur la skarlatan haŭton, tremantan pro ilia tuŝado. Ekodoris dolĉe konvaloj kaj pomoj. La aromoj ĉirkaŭpremis Helenan per malpeza kaj delikata nuboo...

Helena malnodis siajn longajn, nigrajn harojn kaj ŝutis sur ilin ruĝajn papavojn. Poste blanka plektaĵo el floroj zonis ŝian elastan torson kaj karesis ŝian haŭton. Kaj estis ĉarmaj tiuj aromaj floroj sur la senvesta beleco de ŝia aroma korpo.

Poste ŝi demetis la florojn de si kaj denove kolektis la harojn je alta nodo, kovris sian korpon per fajna vesto kaj fiksas ĝin per ora agrafo sur sia maldekstra ŝultro. Ŝi memstare faris por si ĉi tiun veston el delikata ŝtofo, do ankoraŭ neniu vidis ĝin.

Helena ekkuŝis sur la malalta kuŝejo, kaj dolĉaj revoj estis flugantaj en ŝia kapo, – revoj pri senpekaj karesoj, pri ĉastaj kisoj, pri modestaj rondodancoj sur herbejoj kovritaj per dolĉa roso, sub la klara ĉielo, kie brilas la serena kaj milda suno.

Ŝi rigardis al siaj nudaj gamboj, – la ondolinioj de la kruroj kaj femuroj milde fluis el sub la faldoj de la mallonga robo. La flavetaj kaj skarlataj delikataj tonoj sur la haŭto apud la monotone flaveta blanko de la ŝtofo ĝojigis ŝiajn okulojn. La elstarantaj partoj de la ostetoj sur la genuoj kaj la piedoj kaj la kavetojn apud ili, – ĉion Helena observis kun amo kaj ĝojo, kaj tuŝis ilin permane, – kaj tio donis al ŝi novan ĝuon.

## IV

luvespere Helena forgesis ŝlosi la pordon antaŭ la senvestiĝo. Nuda ŝi staris antaŭ la spegulo, levinte la brakojn super la kapo.

Subite la pordo iom malfermiĝis. En la mallarĝa fendo aperis gapanta kapo de la ĉambristino Makrina, beleta junulino kun servema-ruza mieno sur la ruĝvanga vizaĝo. Helena ekvidis ŝin en la spegulo. Tio estis tiom neatendita, ke Helena ne sukcesis decidi, kion ŝi faru aŭ diru, kaj staris senmove. Makrina tuj malaperis, same senbrue, kiel ŝi aperis. Eblis kompreni, ke ŝi eĉ ne estis ĉe la pordo, ke tio nur ŝajnis.

Helena sentis ĉagrenon kaj honton. Kvankam ŝi sukcesis nur ĵeti rigardon al Makrina, sed al ŝi ŝajnis, ke ŝi vidis malpuran rideton glitintan sur la vizaĝo de Makrina. Helena haste aliris la pordon kaj ŝlosis ĝin. Poste ŝi ekkuŝis sur la malalta kaj mola kuŝejo kaj meditis malgaje kaj konfuzite...

Malagrablaj suspektoj aperis en ŝi...

Kion Makrina diros pri ŝi? Nun ŝi certe iris en la servistejon kaj tie rakontas al la kuiristino flustre, kun aĉa rido. Ondo de honta teruriĝo trakuris Helenan. Ŝi rememoris la kuiristinon Malanja – la ruĝvangan junan virinon, gajan, kun ruza hihio...

Sed kion nun diras Makrina? Al Helena ŝajnis, ke iu flustras al ŝiaj oreloj la vortojn de Makrina:

- Kaj jen mi vidas tion tra la malfermaĵo: la mastrino staras antaŭ la spegulo en la kostumo de Eva, – tute nuda, elmontranta sin tute.
- Kion vi diras! – Malanja eksklamas.
- Je dio! – Makrina diras, – la tutnuda, kaj dismontras sin, – kaj dismontras sin, – jen tiel turnas sin, jen ĉi tiel...

Makrina paŝas surloke, imitante la mastrinon, kaj ambaŭ ridegas. La cinikaj, vulgaraj vortoj sonis kun senindulge abomena klareco; pro tiuj ĉi vortoj kaj pro la maldelikata rido de la ĉambristino kaj la kuiristino la vizaĝon de Helena kovris arda ruĝo de honto kaj ofendiĝo.

Ŝi sentis honton en sia tuta korpo, – ĝi estis disfluanta kiel flamo, kiel malsano voranta la korpon. Helena longe kuŝis senmove, en ia stranga kaj obtuza konsterniĝo, poste ŝi komencis malrapide vesti sin, kuntirante la brovojn, kvazaŭ penante solvi ian malfacilan problemon, kaj atente pririgardante sin en la spegulo.

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# *Ses rakontoj*

de Ĵenja Amis



## LA GRANDA FORIRO

*Al ĉiuj, kiuj forpasis pro KOVIM-19.*

La Insulo de Rapidfluejo estas longa strio de tero, kiu dividas la riveron en du paralelaj fluoj. Unuflanke la akvo estas trankvila, kiel spegulo – neniuj moviĝoj. Aliflanke estas la Rapidfluejo: tie la akvo blanke kirliĝas kaj ondiĝas, kiel tempesta oceano. Neniuj ŝipoj aŭ eĉ boatoj povas trapasi tie. Mi povas spekti dum horoj la trankvilan akvon subite fali kaj formi tiun blankan, kvazaŭ bolantan ŝaŭmejon. Tiel eble transformiĝis niaj vivoj komence de KOVIM... de la trankvila antaŭvidebla fluo al la freza kirliĝejo de la nekoneblo...

Rigardante de la parko la urbon – tiom proksiman, kaj tiom foran – mi sentas min kvazaŭ sur ŝipo, kiu rapide kuras kaj jen baldaŭ tuŝos la teron. Ĝis la 1930aj jaroj tiu ĉi loko estis elektrogenerejo. Nun ĝi estas parko kaj rezervejo por birdoj – pli ol 200 specioj! Florabundo, verdejo, paradizo... La Rapidfluejo neniam frostiĝas, eĉ se la aliaj partoj de la riverego glaciĝas – tiel la migraj birdoj povas halti por ripozi dumvoje kaj trovi abundan manĝaĵon eĉ vintre.

Laborante de hejme, mi povas bicikli al la Parko de la Rapidfluejo eĉ ĉiutage se mi volas. La rivero kaj la bestoj estas miaj plej bonaj amikoj dum pandemio. La birda rifuĝejo fariĝis ankaŭ mia rifuĝejo. Mi rifuĝas tie de KOVIM. Mi regajnas tie miajn fortojn. Mi spektas kastorojn naĝi aŭ porti branĉojn; mi fotas marmotojn, procionojn, testudojn – kaj birdojn.


**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

# *Letero al Doktoro P.*

**de Paulo Sérgio Viana**



En blua, freŝa frumateno aŭtuna, kiam la unuaj taglumoj eniris la ĉambrojn de la maljunulejo “Digno kaj Amo”, kie mi servas kiel purigisto, mi trovis s-ron Antono mortinta. Verŝajne li forpasis dum la nokto, antaŭ kelkaj horoj, ĉar lia korpo estis jam sufiĉe rigida kaj liaj okuloj, opakaj. Mi tion sciigis al la administranto kaj al la flegistino, kiam ili alvenis. Kaj mi komencis kolekti la objektojn de la mortinto, laŭ ordinara regulo. Cetere tre malmultajn objektojn, plej ofte destinitajn al rubujo: du kalsonojn, du ĉemizojn, uzitan sapon, du ŝtrumpojn, okulvitron, krajonon. Certe rubaĵojn. Inter tiuj ĉifonoj, vekis mian atenton flava koverto, ne fermita, en kiu mi trovis kelkajn ĉifitajn paperfoliojn kovritajn per apenaŭ deĉifrebla krajonskribaĵo. Mi decidis tuj forĵeti ankaŭ tion, sed sur la koverto estis klare legebla: “Al Doktoro P.”. Certe unu plia frenezaĵo de tiuj senilaj frenezetaĵoj maljunuloj, kiuj loĝas dum jaroj en ĉi tiu azilo. Tamen, ia konfuza skrupulo malpermesis, ke mi forĵetu la koverton. Mi decidis konservi la paperaĵon; mi kunportis ĝin hejmen, kaj petis de mia filo, kiu ĵus aprobiĝis en la lasta jaro de la gimnazio, ke li helpu min transmeti la preskaŭ nekompreneblan tekston al io sencohava. Jen la rezulto:

Estimata Doktoro P.:

De longa tempo mi nutras la deziron skribi al vi leteron – pardonu min pro tia aŭdaco. De kelkaj tagoj mi sentas, ke mia vivo, tro longa vivo, alvenas al la fino; estas do tempo plenumi mian naivan, senkulpan, malmalican deziron. Pardonu min, mi ripetas.

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**



# *Du nuntempaj hispanaj poetoj*

**de Miguel Fernández**



Jam de longe, mi rigardis ĉiuflanke bela la taskon projekcii mian poezian Esperanto-agadon ekster Esperantuojn. Mi metis mian poezion je la servo de justaj popolaj depostuloj. Tiucele, jen en kvartalaj kulturcentroj, jen en najbar-asocioj... kaj jen eĉ sur publikaj placoj, mi dulingve (Esperante-hispane) deklamis miajn versojn. Laŭe al la koncepto kreita de la granda hispana poeto Gabriel Celaya (1911-1991), mi uzis la poezion kiel “armilon ŝargitan per futuro”. Feliĉe, tio kontaktigis min kun, eble, la plej grava el ĉiuj nuntempaj hispanaj poetaj opoj, nome kun la granda po- etgrupo praktikanta la soci-kritikan poezion t. n. “poezion pri la kritika konscienco”.

Nune, mi konatas tiumedie kiel “la voĉo de Esperanto en la grupo”. Plej divers- as la komunaj publikaj prezentadoj de niaj poemoj. Miaflanke, diversrimede, mi diskonigis en Esperantujo la personecon kaj poezion de ne malmultaj el tiuj grupa- noj. Ekzemple, en 2016, la majorka neesperanta, sed ja esperant-ama, liberecana eldonejo Calumnia Edicions proponis al mi esperantigi antologion de poemoj de ĉi-skolaj poetoj. Jen la rezulto: la 23-opa poemaro *Nova mondo en niaj koroj* (2016), represita en 2019. Aliflanke, en 2017 mi okupiĝis, krom pri la prologo, pri la esper- anta areo de la dulingva (hispana-Esperanta) poemaro *Vamos, vemos / Ni iras, vi- das* laŭ la deziro de la aŭtorino, María Ángeles Maeso, unu el la ĉefaj voĉoj tiuskolaj.

Ene de la poetaro pri la kritika konscienco, troviĝas homoj samgeneraciaj, ĉu kiel mi, ĉu kiel mia filino. Kaj eĉ pli junaj. Nun mi volas prezenti al la legantaro de *La Ondo de Esperanto* versojn de du tiuskolaj kolegoj kaj amikoj samgeneraciaj kiel mi: Fernando Barbero kaj Juan Antonio Mora.

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

**<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>**

# Venĝi sian rason

Ankaŭ en 2022 la komitato por la literatura Nobel-premio trovis profesoron, ĉi-jare eĉ profesorinon kun legantoj. La francino Annie Ernaux ricevis la premion pro “la kuraĝo kaj klinika akreco, per kiuj ŝi malkovras la radikojn kaj kolektivajn limojn de persona memoro”. Do bone. Ernaux deklaris en Stokholmo, dankante por la premio, ke ŝi kiel junulino promesis “venĝi sian rason”. Per tio ŝi referencas ne al antropologia kategorio, sed al Arthur Rimbaud kaj ties ekkrio: “Mi estas por ĉiam de malnobla raso”. La vorton “raso” ni traduku kiel gento aŭ socia klaso.

Ernaux ja venas de tre modera familio de laboristoj, etmagazenistoj kaj kafejestroj. De sia patrino ŝi lernis la plezuron legi. La libro *Virino* (1988) temas pri la patrino. En mallongaj, senornamaj frazoj ŝi ne nur esploras la vivon, sed inkluzivas ankaŭ politikajn aspektojn. Finfine, *Virino* ne estas tradicia viv-priskribo, sed io inter literaturo, sociologio kaj historio, kiel Ernaux mem konstatis. Tiuj, kiuj priskribas ŝian stilon, uzas la vortojn “objektive”, “banale”, “senemocie”, “neŭtrale”. Breĉojn en sia memoro ŝi ne plenigas per fikcio, sed klopodas esplori, kio kaj kial ne plu estas en ŝia memoro. Ernaux klopodas doni voĉon al tiuj sen voĉo kaj trakti temojn pri kiuj “oni” ne parolas.

Se oni prilumas la nedireblan, tiam ĝi fariĝas politika.

Unu el tiuj temoj estas aborto. Ernaux menciis tiun traŭman sperton jam en sia unua verko *La malplenaj ŝrankoj* (1974). Pli detale ŝi rakontas pri ĝi en *La okazaĵo* (2000). “Nedirebla”, tamen sur alia nivelo, estas ŝia publika analizo de siaj amrilatoj. En *La junulo* (2022) Ernaux rakontas pri amrilato inter ŝi kiel mezaĝulino kaj juna viro. *Simpla pasio* (1991) temas pri amindumo inter ŝi kaj edziĝinta orienteŭropa viro.

Ernaux opinias, ke doni vortojn al tio, kion socio ne kuraĝas preparoli, povas krei ejon por emancipiĝo kaj esti la unua paŝo al liberigo por tiuj, kiuj estas senpovaj pro ilia klaso, raso aŭ sekso. Tiun konvinkon ŝi ripetis en sia stokholma dankprelego.

Estas surprize, kion Ernaux esperas atingi per sia verko. Ŝi tamen aldonas, ke ŝi konas la diferencon inter verkado kiel politika ago kaj esprimo de vidpunktoj en aktualaj eventoj kaj konfliktoj.

Evidente la maldekstrularo estas la politika hejmo



de Ernaux. Kompreneble – kaj prave – ŝi subtenas la ribelon de virinoj en Irano, sed dum sia Nobela prelego ŝi ne menciis, ke ankaŭ multaj viroj protestas kontraŭ la pastra teokratio. Ŝi same ne parolas pri sia subteno de BDS, tiu bojkotmovado kontraŭ la ŝtato Israelo.

Mi opinias, ke tiu emo al liberigo de la mondo estas tro facila kaj senkosta por Ernaux. Probable membiografia fikcio, subskribo de peticioj kaj belaj intencoj ne ŝanĝas ion ajn. Estas lokoj en la mondo, kie montri malplenan paĝon de papero povas kosti 15 jarojn en karcero. Kaj estas verkistoj, kiuj pagis kaj pagas tre altan prezon por sia engaĝo. Unu el ili estas Salman Rushdie. La 12an de aŭgusto 2022 fanatika idioto klopodis murdi kaj tiel plenumi la kondamnon al morto de 1989 de la pastra reĝimo en Irano. (Rushdie ankaŭ instruas literaturon, do jen eble ideo por la Nobela komitato.) Se Ernaux vere volas ŝanĝi la mondon, ŝi povintus rezigni la premion kaj transdoni ĝin al Rushdie.

**Wolfgang Kirschstein**

## **Laŭro de la Akademio por Sesdek ok de Johansson**

Pasintjare la Akademio de Esperanto kreis ĉiujaran premion “Laŭro de la Akademio”. La selekto de verko al kiu atribui la premion antaŭvidatan de la dua artikolo de la statuto de la Akademio estas unu el la du taskoj de la Literatura Sekcio de la Akademio; la dua estas kompilado de aldona parto al la *Esperanta Antologio*, kiu alvenas nur ĝis 1981.

La regularo (<https://www.akademio-de-esperanto.org/>) fiksas premion de 100 eŭroj.

La ĵurio devas esti almenaŭ kvinmembra, proponita de la Literatura Sekcio kaj aprobita de la tuta akademio; la ĵurion povas ŝanĝi la Akademio ene de du monatoj post la anonco de la antaŭa premio. Ĉi-jare ĝi estis la sama kiel pasintjare, kaj konsistis el: Carlo Minnaja (prezidanto), Javier Alcalde Villacampa, Edmund Grimley Evans, Nikolao Gudskov, Jesper Jacobsen, Valentin Melnikov, Barbara Pietrzak. Entute sep membroj el ses landoj kaj ses lingvoj; ĉi-jare ĉiuj estas anoj de la Literatura Sekcio, ĉar ankaŭ tiu kiu ne estis ano pasintjare nun aniĝis.

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

## Akademio, legu!


Rokicki, Ryszard. *Enkonduko en la morfologion de Esperanto*. — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2022. — 88 p. — (Serio Scio, №11).

Radikoj kaj vortoj en Esperanto estas tikla temo, kiu meritas multe pli da atento ol ĝi ricevas. Komence la aŭtoro mencias, ke ja ni disponas pri ampleksaj libroformaj priskriboj de la Esperanta morfologio, sed ke eĉ tiuj “preteratentas aŭ dubveke prezentas kelkajn fenomenojn” ĝuste sur la kampo de la vortformado. Mi konsentas kun tiu aserto kaj aldonas, ke tio, kion la aŭtoro nomas “lingvo-teoriaj ... kontribuadoj de unuopaj esperantologoj”, grandparte spegulas ne la aplikon de iu ĝenerala lingvistika teorio al Esperanto, sed privatan teoriumadon por interna uzo, ne defendeblan en profesiaj rondoj ekster la Esperanto-komunumo.

“Kial lingvistiki pri Esperanto?” estas la titolo de la dua enkonduka sekcio. En la demando mem estas kaŝita la respondo: Ĝuste tial! Ĝuste tial, ke se mi devus klarigi al neesperantista fakulo la signifon de *lingvistiki*, mi troviĝus en embaraso. Mi konjektas *okupiĝi pri lingvistiko*, sed mi ne certas pri *profesie* aŭ *hobie*. PIV ne helpas. Ĉu tiu verba uzo de abstrakta ento estas priskribebla per iu regulo? En sia verko, Rokicki faras seriozan provon aliri profesie al tiu ĉi kaj aliaj demandoj.

En ĉapitro 3-a la aŭtoro iel resumas la priskribon de la Esperanta vortfarado, kiun la Akademio publikigis en siaj *Aktoj* pri la periodo 1963–1967. Ĝia plej detala teoria ellaboro estas trovebla en *Plena Analiza Gramatiko*, lastfoje eldonita en 1985, siavice bazita sur la laboroj de René de Saussure en la dekaj jaroj de la pasinta jarcento.

Ĉapitro 4-a resumas la vortfaradajn esplorojn de Rokicki. Anstataŭ la Akademian distingon inter substantivaj, adjektivaj, verbaj kaj adverbaj radikoj la aŭtoro proponas tri novajn “genrojn”: la subjektan, la predikatan kaj la epitetan. La novaĵo ŝajnas nur terminologia, kiu, krome, pro sia sintaksa karaktero, daŭrigas pli ol centjaraĝan eraron en la esperantologia literaturo. Nepre preferindas la uzo de semantikaj kategorioj, indukteblaj el la tradukoj en la Universala Vortaro kaj modernaj aŭtoritataj vortaroj.



**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

## Grandioza florkolekto

Boulton, Marjorie. *Unu animo homa: Plena poezia verkaro de Marjorie Boulton: 2 volumoj / Redaktis Edmund Grimley Evans. – Barlastono: Esperanto-Asocio de Britio, 2022. – 1212 p.*


Marjorie Boulton estis la kandidato al la Nobel-premio pri literaturo far la Esperanta PEN-centro ekde 2006, post la forpaso de la antaŭa kandidato William Auld. Siavice, post 2006 la Akademio Literatura de Esperanto kandidatigis Baldur Ragnarsson. Komparo de ĉi tiuj du kolosoj de la esperanta kulturo ne celus montri rivalecon, nur ja montri kiom gravaj estis ĉi tiuj du personecoj kaj tra kiuj verkoj la esperantanoj povas ilin koni komplete.

Pri Baldur Ragnarsson la pleto estas jam preta, ĉar jam aperis plena originala verkaro *La lingvo serena* (Red. M. Nervi, Edistudio, 2007), al kiu tamen aldoniĝos malfruaj poemoj kaj artikoloj.

Profundan studadon pri Marjorie permesas nun la kolosa laboro de Edmund Grimley Evans *Unu animo homa* (Esperanto-Asocio de Britio, 2022) entenanta la plenan poezian (nur poezian!) verkaron de la brita doktorino. Du volumoj, 1212 paĝoj: la kovrilo de ambaŭ prezentas portreton de Marjorie en la tute sama pozicio kaj enkadrigo, sed la duavoluma portreto progresas al leĝera rideto, tiom familia al la personoj (kiel mi) kiuj havis la bonŝancon konatiĝi kun ŝi persone kaj aŭskulti de ŝi lekciajn, deklamadojn, prelegojn.

La enordigo de tiel vasta poemaro ne estis facila; ŝi lasis ĉiujn rajtojn pri publikigo al la Esperanto-Asocio de Britio kaj Grimley Evans jam en 2014 antaŭ la forpaso de Boulton komencis ordigi, kun ŝia helpo, por kritika reeldono de la elĉerpitaj verkoj; post ŝia forpaso (la 30an de aŭgusto 2017) li transportis el ŝia hejmo ĉiujn librojn, privatajn taglibrojn kaj paperojn kiuj povis alceli la plenumiĝon de la programo. Tiel estis malkovritaj eĉ poemoj neniam eldonitaj, kiuj nun riĉigas ĉi tiun verkon.

La unua poemo en esperanto de Boulton estas de 1952 kaj aperis en *Esperanto en Skotlando*. Sub ŝia nomo estis publikigitaj kvin poemaroj, ekde *Kontralte* (Stafeto, 1955) ĝis *Du el* (TK-Stafeto, 1985); *Nuntempa episo* estis verkita en 1953, sed neniam antaŭ nun publikigita, kvankam ekzistis tajpaĵo kaj parta surkaseda deklamado far Auld.



Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

# Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” deziras al ĉiuj  
abonantoj kaj kunlaborantoj, kaj al iliaj proksimuloj, gajan  
Kristnaskon kaj bonan jaron 2023!

*(Senpaga foto de Adobe)*

# Feliĉan Novan Jaron!

- Kio estas via plej granda deziro por la jaro 2023?
- Plej rapide forgesi la jaron 2022.

- Kion donacis via koramikino al vi por novjarfesto?
- Neforgeseblan nokton de amo.
- Amuze, al ĉiuj ŝi faras la samajn donacojn...

Okaze de la novjarfesto judo donacis al sia familio grandan parolantan papaginion. Sed kiam oni forigis la tukon de sur la kaĝo, ĝi tuj ekkriis: “Mi deziras amori!” La krioj daŭris kaj tedis la judon. Li iris al rabeno. La rabeno enpensiĝis: “Hm, donu ĝin al mi. Mi havas du papagojn kaj ili estas tre piaj, ili preĝas de matene ĝis vespere kaj certe reedukos vian papaginion”. Tuj post veni al la domo de la rabeno la papagino ekkriis: “Mi deziras amori!” La papagoj kontente rigardis unu la alian: “Ŝajnas, ke Dio atentis niajn preĝojn!”

- Mi tiom multe legis pri danĝeroj de la fumado kaj drinkado, ke post la novjarfesto mi decidis ĉesi.
- Ĉu fumi aŭ drinki?
- Legi.

Trafikpolico haltigis aŭton kaj demandas la ŝoforon:

- Kien vi hastas?
- Hejmen. Mi festis la Novjaron kun amikoj, kaj eble mia edzino jam iom maltrankvilas.
- Sed nun estas majoj!
- Do pro tio mi hastas.

Knabo skribas leteron al Avo Frostoj: “Kara, donacu al mi fratino...” Avo Frostoj sendas respondon: “Mi klopodos, etulo. Sendu al mi vian panjon...”

Unu viro demandas la alian:

- Kion vi donacis al via edzino por novjarfestoj?
- Vojaĝon al Tajlando.
- Kaj kion ŝi donacis al vi?
- Ŝi forflugis.

Plukis kaj tradukis **Stanislav Belov**

# **Spritaj splitoj kaj preskeraroj**

## ***El la kolekto de reduktoro***

### ***Overkill, aŭ: La mortigita morto***

Sufokita kadavro... Sinpendiga kadavro de knabino kun kimono larĝmanika (Yumeno Kyûsaku. *Sufokita kadavro*. Trad. Noriko Sibayama // *Novajoj Tamtamas*, dec 2022, p. 3)

### ***Fortaj frotoj aŭ: Kneda omaĝo***

Internacia Tago de Holokaŭsto... ni parolos pri la masaĝo al UN kiun UEA sendos tiuokaze. (Amri Wandel, esperanto-landa-agado, 21 jan 2022; rimarkis Lu Wunsch)

### ***Mispaŝo leksikologia***

Stumbli... elitfali (Marinko Ĝivoje. *Esperantonimoj*. Pisa: Edistudio, 2020, p. 110; trovis Ionel Oneţ)

### ***Obskuraj planoj sub kaŝitaj pladoj***

Laŭ mia impresio la sekretaj servicoj de Usono kaj Britio kontrolas UEA-n trouzante ĝiajn eternajn financajn malfacilaĵojn. ([liberafolio.org/2022/08/02/batalo-pri-la-ru-sia-cefdelegito](http://liberafolio.org/2022/08/02/batalo-pri-la-ru-sia-cefdelegito))

### ***Frapa genro, aŭ: Pezmana ŝtonkorulin'***

keresztapa – baptopatro

keresztanya – batopatrino

(*Tema vortaro por ekzameno pri Esperanto en Hungario*. [sites.google.com/site/eszperantovizsga/szoszedetek/csalad](https://sites.google.com/site/eszperantovizsga/szoszedetek/csalad))

### ***Italino plenplenigas***

Foto da Michela Lipari (listo komitato-de-uea, 26 jul 2022; rimarkis Ibrahim Bryzgaloff)

### ***Silenta enterigo***

La solan, iomete sukcesan agadon de la estraro, la virtualan kongreson kiun povis spekti pli larĝa publiko oni lasis tombi. ([liberafolio.org/2022/08/09/la-co-estis-fakte-modelo-por-la-movado/#comment-9138](http://liberafolio.org/2022/08/09/la-co-estis-fakte-modelo-por-la-movado/#comment-9138))

### ***Civitparol', stilekzercesko***

Kapitulo pri kultura efervesko en la Civita konsorcio (Titolo de HeKo 789 1-C, [esperantio.net/index.php?id=4544](http://esperantio.net/index.php?id=4544), 12 jun 2022)

Plukis **István Ertl**



**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

**Britio:** EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk.

**Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

**Ĉinio:** Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

**Estonio:** Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

**Finnlando:** EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

**Hungario:** Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

**Hungario:** Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

**Katalunio:** Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

**Litovio:** Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

**Norvegio:** Esperanto-Oslo, Morenefarefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: oficejo@esperanto.no.

**Nov-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

**Ruslando:** Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

**Ĝi estas demonstra versio de la 139-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

**Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>